


EL POPOLA ĈINIO

2
1976

中國報道






Al Mačo (novjara bildo)

de Nan Junšeng kaj Van Gujhiang

Ŝanĝiĝo de Sukian-gubernio

Ĝardenosimila kamparo konstruita de la popolanoj de Sukian



Post pena klopodado, multaj lokoj de nia lando atingis grandajn sukcesojn en lerno de Daĝaj en agrikulturo. La gubernio Sukian norde de Huajhe-rivero estas unu el ili. Post pena klopodado en la pasintaj kvin jaroj, ĝi ŝanĝis sian antaŭan fizionomiĝon de oftaj katastrofoj kaj malalta produktivo kaj nun ĉiu homo en la gubernio havas dekkvinonon da hektaro da kampo de stabila kaj alta produktivo. La totala produkto-kvanto de greno de la gubernio en 1974 estis 2.4-oblo de tiu en 1969, kaj la gubernio fariĝis avangarda tipo de Giangsu-provinco en lerno de Daĝaj.

Sekretario de la gubernia partia komitato (maldekstre) laboras kune kun komunumanoj sur akvoutiliga konstruejo.






Post kvinjara pena laboro la komunumanoj en la nordokcidenta montregiono de Sukian-gubernio multe ŝanĝis la fizionomion de la kampoj kaj ĉiam plialtigis la produktokvanton de greno.



Tritiko bone kreskas sur la reformita marĉejo apud lago.





Nova aspekto de kamparo

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

BILDPAGĜOJ:

1. Ŝanĝiĝo de Sukian-gubernio
2. Riĉa baseno Turpan
3. Intelektaj gejunuloj turnis dezertejon en bonajn kampojn
4. Amatora argila skulptado de kamparanoj

KOVRILO:

- Paĝo 1: Printempaj plantidoj
Paĝo 2: Al Maĉo (novjara bildo) de Nan Junŝeng kaj Van Gujhiang
Paĝo 3: Tapiŝarto de Tiangin
Paĝo 4: Putoborado sur maro



Enhavo

Eterne vivu en nia memoro la granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo kaj glora kontraŭreviziisma batalanto Kamarado Kang Ŝeng!	2
Funebra parolado de Vicprezidanto Je Gianjing	3
Retrorigardo al la Longa Marŝo	12
Kiel Pekino solvas la problemon de loĝdomoj	17
La loĝantoj—mastroj de la loĝdomoj	21
Ĉina eldono de "Matematikaj Manuskriptoj" de Marks	24
KURANTAJ AFEROJ	24
De ŝpatoj al kombajnoj	25
La pekina junulino inter kazaĥoj	29
Juna teknikisto Ĉen Hujbo	32
Surakva lernejo	36
Bronza spegulo el la dinastio Okcidenta Han eksponata en Ŝanhajo	39
AMIKECO: Grava memorinda donacaĵo	41
Frukto de amika kunlaboro	41
TRA ĈINIO: Dadu-rivero	42
METIARTAĴOJ: Giganta murtapiŝo "La Granda Muro"	45
ĈINAJ NACIECOJ: Pumi-nacieco	46

Eterne vivu en nia memoro la la ĉina popolo kaj glora Kamarado



Kamarado Kang Seng

KAMARADO Kang Seng, membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, membro de la Politika Buroo de CK de KPC, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPC, vicprezidanto de CK de KPC kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, for-

pasis post longa malsano en Pekino, 5 minutojn post la 6-a de la 16-a de decembro, 1975, en la aĝo de 77 jaroj.

Kamarado Kang Seng estis eminenta membro de la Komunista Partio de Ĉinio, granda revolucia batalanto de la ĉina popolo kaj marksisma teoriisto kaj unu el la elstaraj gvidantoj de la Partio kaj la ŝtato.

Dum sia tuta vivo Kamarado Kang Seng batalis por la komunisma afero kaj persistis en daŭrigo de la revolucio. En la batalo de la novdemokratia revolucio, en la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado, en la batalo por plifortigo de la unuiĝo de nia partio kun la marksismaj-leninismaj partioj kaj organizoj de la tuta mondo, en la opono kontraŭ la moderna reviziismo kaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio, li montris sin fidela al la Partio kaj la popolo, rezolute plenumis la proletan revolucion linion de Prezidanto Maŭ, rezolute kritikis la reviziismajn liniojn de Vang Ming, Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, rezolute defendis Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, faris senmortan meriton al la Partio kaj la popolo kaj estis kore amata de la tuta partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo de Ĉinio.

Eterne vivu en nia memoro la granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo kaj glora kontraŭreviziisma batalanto Kamarado Kang Seng!

granda proleta revoluciisto de kontraŭreviziisma batalanto Kang Ŝeng!


Funebra parolado de Vicprezidanto Je Gianjing

KUN granda malĝojo hodiaŭ ni funebras pri Kamarado Kang Ŝeng, fidela revolucia batalanto de la ĉina popolo, eminenta membro de la Komunista Partio de Ĉinio kaj partia kaj ŝtata gvidanto amata de la tuta popolo.

Kamarado Kang Ŝeng estas vicprezidanto de la Deko Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso. Kamarado Kang Ŝeng forpasis post longa malsano en Pekino je 5 minutoj post la 6-a de la 16-a de decembro, 1975, en la aĝo de 77 jaroj.

Dum sia tuta vivo Kamarado Kang Ŝeng batalis por la komunisma afero kaj persistis en daŭrigo de la revolucio. Li estis ĉiam fidela al la popolo kaj la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Dum la pasintaj 50 jaroj, li dediĉis sian tutan energion al la granda afero de la liberigo de la ĉina popolo kaj la komu-

nisma afero. Sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, Kamarado Kang Ŝeng faris eminentajn kontribuojn en firmigo kaj disvolvo de la marksisma Komunista Partio de Ĉinio, al defendo de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, al plifortigo de la ideologia-teoria kaj organiza konstruado de la Partio, al la konstruado de la sekuriga kaj konfidenca laboroj de la Partio, al la batalo por renversi la reakcian regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo kaj gajno de la venko de la novdemokratia revolucio, al firmigo de la diktaturo de la proletaro, al disvolvo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, al plifortigo de la unuiĝo de nia partio kun la marksismaj-leninismaj partioj kaj organizoj de la tuta mondo kaj al la batalo kontraŭ la moderna reviziismo. Lia forpaso estas granda perdo por niaj partio kaj popolo kaj la tuta partio, la tuta armeo kaj la tuta pololo sentas grandan malĝojon pro tio.



Solena ceremonio en Pekino por funebri pri Kamarado Kang Ŝeng

Kamarado Kang Ŝeng naskiĝis en Giaŭnan-gubernio de Ŝandong-provinco kaj de sia juneco li dediĉis sin al la afero de liberigo de la ĉina popolo. Li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en 1925 kaj de tiam li longge okupiĝis pri partia laboro kaj gvidis laboristan movadon. Li partoprenis en la laboro de la Strika Komitato de la Movado de la 30-a de Majo kaj estis unu el la gvidantoj de la tri armaj insurekcioj de Ŝanhajo en la jaroj 1926 kaj 1927. Dum sia laborado en Ŝanhajo, li laboris kiel kadro de la Ĝenerala Sindikato de Ŝanhajo, sekretario de la Komitato de la Speciala Partia Filio en la Ŝanhaja Universitato, sekretario de la distriktaj partiaj komitatoj de Huĝong, Ĝabej, Huhi kaj Hu-

dong, membro de la partia komitato de Giangsu-provinco, estro de la Organiza Departamento kaj ĝenerala sekretario de la partia komitato de Giangsu-provinco. En la Tria Sesio de la Sesa Centra Komitato en 1930 li estis elektita kiel membro de la Centra Kontrola Komisiono kaj poste laboris kiel estro de la Organiza Departamento de la Centra Komitato. Ekde la jaro 1933, li laboradis kiel gvidanto de la Delegacio de la Komunista Partio de Ĉinio al la Komunista Internacio. En la Kvina Sesio de la Sesa Centra Komitato en 1934 li estis elektita kiel membro de la Centra Komitato kaj la Politika Buroo de CK. Reveninte al la patrolando en 1937, li laboris kiel sekretario de la Sekretariejo de la Cen-



En la halo de la funebra ceremonio



tra Komitato de KPC, direktoro de la Partia Lernejo sub la Centra Komitato, estro de la Komisiono de la Laborista Movado de la Centra Komitato, estro de la Socia Departemento de la Centra Komitato, estro de la Informa Departemento de la Centra Komitato kaj vicsekretario de la Organiza Komisiono de la Centra Komitato. Dum la Stilĝustiga Movado en Jan-an, li laboris kiel vicestro de la Ĝenerala Lerna Komisiono de la Centra Komitato. En la Sepa Kongreso de la Partio li estis elektita kiel membro de la Centra Komitato kaj en la Unua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato li estis elektita kiel membro de la Politika Buroo de CK. Dum la Liberiga Milito kaj post la liberigo de la lando, li laboris kiel dua vicsekretario de la Orientĉinia Buroo de la Centra Komitato de KPC, sekretario de la Ŝandong-a Subburoo, politika komisararo kaj sekretario de la partia komitato de la Milita Regiono de Ŝandong, prezidanto de la Popola Registaro de Ŝandong-provinco, membro de la Centra Popola Registaro, vicprezidanto de la Tria Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, sekretario de la Sekretariejo de la Centra Komitato de KPC, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tria kaj Kvara Tutlandaj Popolaj Kongresoj, estro de la Teoria Grupo de la Centra Komitato, vicestro de la Komisiono por Eldono de la Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong, konsilanto de la Grupo de la Kultura Revolucio de CK kaj estro de la Grupo de Organizado kaj Propagando de CK. En la Oka, Naŭa kaj Dekaj Tutlandaj Kon-



Familianoj de Kamarado Kang Ŝeng en la funebra ceremonio

gresoj de la Partio li estis elektita kiel membro de la Centra Komitato. En la Unua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato li estis elektita kiel kandidato de la Politika Buroo de CK, en la Dekunua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato kaj la Unuaj Plenaj Sesioj de la Naŭa kaj Dekaj Centraj Komitatoj li estis elektita kiel membro de la Politika Buroo de CK kaj ĝia Konstanta Komitato kaj en la Unua Plena Sesio de la Dekaj Centra Komitato kiel vicprezidanto de la Centra Komitato.

Dum la dekoj da jaroj, en la novdemokratia revolucio kaj socialisma revolucio, en la batalo kontraŭ la internaciaj kaj enlandaj reviziismo kaj oportunismo, en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, Kamarado Kang Ŝeng firme

subtenis la gvidadon de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, rezolute plenumis la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ, brave bataladis kun nefleksebleco kaj donis lernindan ekzemplon por nia tuta partio.

Funebrante pri Kamarado Kang Ŝeng, ni devas lerni tion, ke en la ŝtormo de klasbatalo li firme staris en la flanko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, senkonfuze kaj rezolute oponis kontraŭ reviziismo kaj oportunismo, rezolute kritikis la reviziismajn liniojn de Vang Ming, Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, persistis en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, ĉiam subtenis kun plena entuziasmo novajn fortojn kaj novaĵojn, kaj bataladis la tutan vivon por efektivigo de la granda idealo de komunismo.

Ni devas lerni tion, ke Kamarado Kang Ŝeng persistis en interligo de teorio kun praktiko, diligente studis kaj fervore propagandis verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ. Ni devas lerni lian noblan revolucian kvaliton kaj firman proletan particon, persisti en la principoj de la Partio, observi la disciplinon de la Partio, defendi la unuiĝon de la Partio kaj senlace batali kontraŭ ĉiuj agoj malkonformaj al la intereso de la Partio.

Ni devas lerni lian spiriton ĉiam meti la interesojn de la Partio en la unuan lokon, neniam pensi pri siaj personaj intereso, tutkore labori por la Partio kaj servi al la popolo.

Ni devas lerni lian bonegan stilon de seriozececo, rigoreco, modesteco, diskreteco, vastan interligon kun la amasoj, peneman luktheadon kontraŭ malfaciloj, severecon al si mem kaj modelan kondutadon, kaj rezolute oponi kontraŭ ĉia burĝa vivmaniero.

Granda proleta revoluciisto kaj glora kontraŭreviziisma batalanto de la ĉina popolo Kamarado Kang Ŝeng forlasis nin por eterne. Ni turnu la malĝojon en fortojn kaj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj kun klasbatalo kiel la ĉefĉenero, ni diligente studu la teorion de la diktaturo de la proletaro, persiste praktiku la fundamentan linion de la Partio, persistu en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, batalu por firmigi la diktaturon de la proletaro, kontraŭbatali kaj preventi reviziismon, konstrui nian landon en socialisman modernan potencon kaj por la triumfo de la komunisma afero. Unuiĝu por gajni pli grandajn venkojn.



La 20-an de decembro, 1975, laboristoj, kampanoj, laborantoj de ŝtataj organoj, lernantoj kaj komandantoj kaj batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo venis por solene funebri pri la granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo kaj glora kontraŭreviziisma batalanto Kamarado Kang Ŝeng, en la Kultura Palaco de Laboruloj.



Foto de Kamarado Kang Seng laboranta kiel gvidanto de la Delegacio de la Komunista Partio de Ĉinio al la Komunista Internacio dum la periodo de 1933 ĝis 1936

Kamarado Kang Seng faranta paroladon en la inaŭgura ceremonio de la kvara periodo de la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Kolegio de Jan-an en 1938






Foto de Kamarado Kang Seng en aprilo de 1945, kiam li ĉeestis la Sepan Tutlandan Kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio en Jan-an



Kamarado Kang Seng faranta paroladon en la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, en marto de 1949




Kamarado Kang Ŝeng ĉiam serioze kaj tutkore penlaboris por la afero de la Partio.




En septembro de 1958, Kamarado Kang Ŝeng ĉeestis lekciadon kune kun lernantoj de la laborista kolegio de la Ŝanhi-a Ilmaŝina Fabriko por profunde koni kiel iris la lernejo funkciigata de la fabriko.

En julio de 1963, Kamarado Kang Ŝeng partoprenis en la interparolado inter la kompartioj de Ĉinio kaj Sovetunio kaj faris rezolutan batalon kontraŭ la reviziisma klico de Ĥruŝčov. Kiam li revenis de Moskvo al Pekino, li estis varme bonvenigata de amasoj de la ĉefurbo.



En junio de 1960, Kamarado Kang Ŝeng ĉeestis la Bukareŝtan Konferencon, en kiu li rezolute rebatis la surprizatakon de Ĥruŝčov kontraŭ la Komunista Partio de Ĉinio kaj defendis Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson.

Kamarado Kang Seng en la
Deka Tutlanda Kongreso de
la Komunista Partio de
Ĉinio, en aŭgusto de 1973



Kamarado Kang Seng faris
paroladon en la Dua Plena
Sesio de la Naŭa Centra
Komitato de la Komunista
Partio de Ĉinio, en aŭgusto
de 1970.

Retrorigardo al la Longa Marŝo

(Daŭrigo)

IV

Kiam la Centra Ruĝa Armeo faris la Longan Marŝon, la Kvara-fronta Armeo en la Siĉuan-Ŝenhi-a Bazo venke frakasis ĉirkaŭatakon de la malamikoj en ses kolonoj. Sed Ĝang Guotaŭ daŭre persistis en la dekstra oportunistima linio de fuĝado, forlasis la Siĉuan-Ŝenhi-an Bazon kaj fuĝis okcidenten kun siaj trupoj. Tiuj trupoj transpasis riverojn Gialing, Fugiang kaj Mingiang, kaj kuniĝis kun la Unua-fronta Armeo ĉe Lifan (nun Lihian) kaj Maŭgong.

Rilate al la eraro de Ĝang Guotaŭ, Prezidanto Maŭ ĉiam aplikis la ĝustan principon de enpartia batalo. Post la kuniĝo de la trupoj, la Centra Komitato de la Partio kunvokis kunvenon de la Politika Buroo en Lianghekoŭ kaj decidis plue marŝi norden. Post la kunveno, la trupoj sub la gvido de Prezidanto Maŭ ekiris en la lasta tagdeko de junio, transpasis la neĝkovratajn montegojn Mengbi, Ĉangban kaj Dagu kaj venis al Maŭ-ergaj proksime de Songpan. Sed tiam Ĝang Guotaŭ ankoraŭ ne rezignis sian eraran linion de fuĝismo. Antaŭ la kuniĝo de la Unua-fronta kaj Kvara-fronta Armeoj li jam fondis la Nordokcidentan Federacian Registaron. Tio montris, ke lia celloko estis nordokcidenta Ĉinio inkluzive Hikang, Kinghaj, la nordokcidenta parto de Gansu kaj Hingiang. Tiutempe li daŭre retiriĝis al la regionoj de Hikang kaj Kinghaj loĝataj de nacimalplimulto laŭ la antaŭa plano. La Centra Komitato de la Partio foje kaj refoje telegrafis al li por lin revoki, sed vane.

Prezidanto Maŭ ordonis la trupojn prepari al si grenon por trapasi la marĉan herbejon kaj samtempe pacience atendis lin unu monaton en Maŭ-ergaj. Tiam la japana imperiismo estis in-


tensiganta sian invadon al Ĉinio kaj post la Evento de la 18-a de Septembro en 1931, ĝi invadis Ĵehe-provincon* post la okupo de Liaŭning, Gilin kaj Hejlonggiang, kaj poste la nord-ĉiniajn provincojn kaj en malpli ol 4 jaroj ĝi jam okupis kaj invadis preskaŭ duonon de nia tuta teritorio! Frue en januaro de 1933 nia Partio jam deklaris, ke ni voluntas rezisti kontraŭ la japana agreso kune kun la armeoj de la tuta lando sub tri kondiĉoj (nome: 1. ĉesi ataki la revoluciajn bazojn kaj la Ruĝan Armeon; 2. doni liberon al la popolo; 3. armi la popolon — la red.). Sed la kuomintangaj reakciuloj tute malzorgis la sorton de la nacio. Unuflanke ili kapitulacis al Japanio kaj aliflanke “ĉirkaŭatakis” kaj persekutadis la Ruĝan Armeon per pli kaj pli multaj trupoj, kun la intenco tute ekstermi la Ruĝan Armeon. Ilia reakcia ago forte indignigis la popolon. La enlanda publika opinio tre simpatiis nian Partion pro ĝia patriota sinteno kaj esperis, ke ĝi prenos sur sin la grandan taskon de rezisto kontraŭ la japana agreso. Nia Partio antaŭlonge jam faris alvokon de ĉesigo de la enlanda milito kaj kuna rezistado kontraŭ la japana agreso kaj pro tio ricevis varman subtenon de diversaj sociotavoloj de la popolo kaj per tio batis la Ĉiang-Kajŝek-an reakcian politikon de insisto en enlanda milito.

Tuj poste, la Politika Buroo de la Centra Komitato okazigis kunvenon en Maŭ-ergaj kaj faris rezolucion pri la politika situacio kaj la tasko post la kuniĝo de la Unua-fronta kaj Kvara-fronta Armeoj. Tiu kunveno decidis, ke la armeo daŭre marŝu norden en du kolonoj. La dekstra kolono gvidata de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ konsistis el la Unua kaj Tria Armegrupoj de la Unua-

fronta Armeo kaj la Kvara kaj Trideka Korpusoj de la Kvara-fronta Armeo. La maldekstra kolono gvidata de Ĉefkomandanto Ĝu De kaj Ĝang Guotaŭ konsistis el la Naŭa kaj Tridekunua Korpusoj de la Kvara-fronta Armeo kaj la Kvina kaj Naŭa Armegrupoj de la Unua-fronta Armeo.


La dekstra kolono iris tra la marĉa herbejo, poste al Banjoŭ, Bahi kaj Ahi kaj ekstermis unu malamikan divizion de Hu Zongnan ĉe Giugisi sur la bordo de Baŭzuo-rivero. La maldekstra kolono ekiris de Ĝuokegi kaj marŝis tra la marĉa herbejo al Aba kaj Banjoŭ. Sed kiam ĝi atingis Aba, Ĝang Guotaŭ pliapaŝe malkaŝis sian ambicion spliti la Partion kaj li eĉ telegrafis al la Centra Komitato por postuli, ke la dekstra kolono marŝu suden. Kvankam la Centra Komitato plurfoje montris al li per telegramoj, ke nur norden-marŝo estas elirejo, kritikis lian eraron de sudenmarŝo, kaj poste eĉ severe ordonis lin iri norden, sed Ĝang Guotaŭ tute ignoris la instrukcion de la Centra Komitato de la Partio kaj insistis en la erara linio.


La Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo rigore observas la Tri Ĉefajn Regulojn de Disdisciplino kaj la Ok Punktojn de Atentigo dum la Longa Marŝo. La ruĝarmeaj trupoj tranoktinta ĉe Liangŝujging aĉetis porkon de kampanano Ĝaŭ Ĝinhe kaj pagis al li monbiletojn de 15 juanoj (dekstre), kaj Ĉen Ŝujong, kompaniestro de la Ruĝa Armeo, donis al li atestilon pri la aĉeto, por ke la lasta ŝanĝu la monbiletojn kontraŭ arĝentaj moneroj kun la sekvantaj trupoj.



Kvankam nur 7,000-8,000 homoj restis el la dekstra kolono, tamen la decido de la Centra Komitato marŝi norden tute ne ŝanceliĝis. En septembro, la trupoj ekiris de Bahi, transpasis Baŭzuo-riveron, marŝis antaŭen laŭ Bajlong-rivero en suda Gansu, iris tra vojeto elhakita sur rokmuroj, konkeris la pasejon Lazikoŭ, poste transiris la montaron Minŝan, forlasis la regionon de neĝmontoj kaj marĉa herbejo kaj alvenis al Hadapu inter Minhian kaj Higu en la suda parto de Gansu. La malamiko haste kolektis ĉ. 300,000 soldatojn por fari obstrukcan batalon apud Vejšuj-rivero. La Ruĝa Armeo ripozis du tagojn en Hadapu kaj komencis sin movi ŝajnigante sin marŝanta al Tianŝuj por logi la ĉefan forton de la malamiko al Tianŝuj. Per senhalta marŝo ni facile trapasis la blokadon linion de Vejšuj inter Vuŝan kaj Ĝanghian kaj okupis Suoluo kaj Tongvej. En oktobro, ni tramarŝis regionon loĝatan de hujoj, trarompis la blokadon linion inter Hujning kaj Gingning en la orienta parto de Gansu kaj tiun inter Pingliang kaj Gujuan (en nuna Ninghia), venkis la kvar persekutajn kavaleriajn regimentojn de la malamiko, transpasis la altan monton Liupanŝan en Gujuan, trapasis Huanhian kaj venke kuniĝis kun la 15-a Armegrupo de norda Ŝenhi en Vukiĝen, unu el la revoluciaj bazoj de norda Ŝenhi. La batalo en Ĝiluoĝen frakasis la trian "ĉirkaŭekstermon"

Specimenoj de herboj kiujn la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo prenis kiel manĝaĵon kaj la veŝto el palmbasto farita de la Ruĝa Armeo dum trapasado de la marĉa herbejo en la Longa Marŝo.





Sloganoj skribitaj de la Ĉina Laborista-Kampanara Ruĝa Armeo en la Longa Marŝo



Litografa maŝino uzita de la Ĉina Laborista-Kampanara Ruĝa Armeo en la Longa Marŝo

de Ĉiang Kajŝek al la Ŝenhi-Gansu-a Limregiono kaj metis fundamenton por la tasko de la Centra Komitato de la Partio loki la tutlandan ĉefstabejon de la revolucio en nordokcidenta Ĉinio.

Post veno al norda Ŝenhi, la Centra Komitato de la Partio okazigis en decembro de 1935 kunvenon de la Politika Buroo de la Centra Komitato en Vajaŭbu. La kunveno kritikis la eraran opinion en la Partio, ke la nacia burĝaro de Ĉinio ne povas alianciĝi kun la laboristoj kaj kampanaroj de Ĉinio por rezisti kontraŭ la japana agreso, kaj decidis la taktikon fondi Kontraŭjapanan Nacian Unuecan Fronton; kaj ĝi montris la longdaŭrecon de la ĉina revolucio kaj kritikis la malvastan enfermiĝemon kaj malpaciencecon al la revolucio longe ekzistantajn en la Partio. Tiuj eraroj estis la fundamentaj kaŭzoj de la seriozaj malsukcesoj de la Partio kaj la Ruĝa Armeo en la Dua Enlanda Revolucia Milito. Zunji-konferenco okazis en la Longa Marŝo de la Ruĝa Armeo, tial ĝi povis fari rezolucion nur pri la plej urĝaj problemoj en milito kaj organizado en tiu tempo. Nur post kiam la Ruĝa Armeo atingis nordan Ŝenhi, la Centra Komitato de la Partio kaj kamarado Maŭ Zedong havis la eblecon sisteme klarigi la problemon de politika taktiko. La kunveno de Vajaŭbu estas ekstreme grava. Post la kunveno, kamarado Maŭ Zedong faris la raporton

“Pri taktiko kontraŭ la japana imperiismo”. Tiu raporto ne nur difinis la tiaman politikon de la Partio kaj sisteme eksplikis la problemon pri fondo de la Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto, sed ankaŭ resumis la fundamentan sperton en la periodo de la du enlandaj revoluciaj militoj kaj difinis la fundamentan linion por la Partio en la periodo de la demokratia revolucio.


V

Post kiam Ĝang Guotaŭ publike deapartiĝis de la Centra Komitato, li kaj la maldekstra kolono kaj la du korpusoj antaŭe apartenantaj al la Kvara-fronta Armeo ree trapasis la marĉan herbejon, transgrimpis la neĝkovratajn montojn, trairis Maŭ-ergaj, Maŭgong kaj Baŭhing kaj retiriĝis al Tiankjuan kaj Luŝan ĉe la limo inter Siĉuan kaj Hikang. En Ĉuomudiaŭ li plene malkaŝis sian intrigon, publike perfidis la Partion, starigis la falsan partian centralon kaj proklamis sin kiel ĝia prezidanto. En tia cirkonstanco, Ĉefkomandanto Ĝu De persistis en la ĝusta principo de Prezidanto Maŭ pri enpartia batalo kaj montris firmecon en observo de politikaj principoj. Kiam Ĝang Guotaŭ instigis lin fari deklaron kontraŭ la Centra Komitato, li ne nur severe rifuzis tion sed ankaŭ pacience propagandis la ĝustan opinion de la Centra Komitato al la kadroj.

La Kvara-fronta Armeo restis 3 monatojn en Tiankjuan kaj Lušan. Tiam parto de la Centra Armeo de la malamiko eniris en Siĉuan kaj komencis ataki nin en kunagado kun siĉuan-a militaristo Liu Hiang. La batalo inter la du armeoj fariĝis pli kaj pli intensa. Tre multe konsumiĝis niaj trupoj kaj Ĝang Guotaŭ hezitis fari decidon. Nur post kiam parto de la defendata tereno estis okupita de la malamiko, li estis devigita retiri la trupojn al Daŭfu, Luhuo, Ĝanhua, Ganzi kaj Daginsi en la nordorienta parto de Hikang kaj ankoraŭ intencis fuĝi al Hining de Kinghaj.

Tiam ankaŭ la Dua-fronta Armeo, kiu ekmarŝis de la bazo ĉe la limregiono de Hunan, Hebej, Siĉuan kaj Gujĝoŭ kaj trairis Gujĝoŭ kaj Junnan, alvenis al Ganzi post batalado sur la longa vojo kaj travivo de multaj malfacilaĵoj. Pro tio ke kamaradoj Ĝu De, Ĵen Biŝi, He Long kaj Guan Hiangjing firme subtenis la ĝustan linion de la Centra Komitato kaj la vastaj amasoj de kadroj de la Kvara-fronta Armeo, kiuj iom post iom vidis, ke la vojo de suden-marŝo estas erara, kaj postulis marŝi norden por rezisti kontraŭ la japana agreso, la splitiga intrigo de renegato Ĝang Guotaŭ tute fiaskis. Li estis de-

La 19-an de oktobro de 1935, la Centra Ruĝa Armeo kuniĝis kun la Ruĝa Armeo de norda Ŝenhi en Vukiĝen kaj finis la grandan Longan Marŝon. La foto montras la nunan Vukiĝen.



vigita nuligi la falsan centralon kaj norden marŝi kun la trupoj.

La trupoj ekiris de Ganzi, trairis Donggu, Aba kaj Baŭzuo, denove transpasis la neĝkovratajn montojn, trairis la marĉan herbejon kaj okupis Hadapu, Dacaŭtan kaj Lintan de suda Gansu en aŭgusto. Tiam la Centra Komitato jam sendis kamaradojn Nie Jongĝen kaj Zuo Kjuan militiri okcidenten kun trupoj por renkonti la Dua-frontan kaj Kvara-frontan Armeojn norden marŝantajn. Kaj samtempe ĝi faris preparon por kampanjo en Gingning kaj Hujning. La Dua-fronta kaj Kvara-fronta Armeoj marŝis en du kolonoj, la Kvara-fronta maldekstre kaj la Dua-fronta dekstre. La dekstra kolono marŝis orienten tra loko inter Hihe kaj Vu-ŝan, konkeris unu post alia Ĉenghian, Hujhian, Kanghian kaj Liangdang en la sudorienta parto de Gansu kaj sieĝis Fenghian por krampi firme la postajon de la trupoj de Hu Zongnan. La trupoj de Nie Jongĝen kaj Zuo Kjuan jam ĉirkaŭsieĝis la malamikajn trupojn de Maŭ Bingven kaj Hju Kehiang kaj sciigis Ĝang Guotaŭ, ke li alrapidu kun siaj trupoj por kune ekstermi ilin. Sed tute neatendite Ĝang Guotaŭ daŭrigis sian eraran fuĝismon kaj arbitre kondukis la maldekstran kolonon plue retiriĝi okcidenten je preteksto de preparo de kampanjo okcidente de Minhian kaj Lintaŭ, kun la intenco iri al Hining de Kinghaj. Sed poste pro malkontento de la trupoj kaj malfacilo en transpaso de rivero, Ĝang Guotaŭ devis retrokonduki siajn trupojn.

Sed Ĝang Guotaŭ ne rezignis sian ambicion kaj arbitre ordonis la Kvara-frontan Armeon transpasi la Flavan Riveron pretekstante plenumi la planon de la Ninghia-a kampanjo. Sed kiam parto de la trupoj transpasis la riveron, la pramejo jam estis kaptita de la alrapidintaj malamikaj trupoj de Hu Zongnan. La trupoj, kiuj transpasis la riveron, marŝis okcidenten laŭ lia plano ĝis Ganĝoŭ (nun Giukjuan) kaj Suĝoŭ (nun Ĝangje) en la okcidenta parto de Gansu kaj estis ĉirkaŭitaj de kuomintangaj trupoj. Kvankam ili kontraŭbatalis brave, tamen malvenkis finfine.

La eraro de Ĝang Guotaŭ grave damaĝis la Partion kaj la Ruĝan Armeon. Sed nur pro tio ke post Zunji-konferenco stariĝis la ĝusta gvida-

do de la Centra Komitato de la Partio kun kamarado Maŭ Zedong kiel la estro en la tuta Partio, la eraro de Ĝang Guotaŭ ne kaŭzis pli grandajn malutilojn. La ĝusta gvido de kamarado Maŭ Zedong ludis decidan rolon en savo de la Kvara-fronta Armeo el sub la erara linio de Ĝang Guotaŭ, en konservo de la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo en ekstreme malfacilaj cirkonstancoj kaj en la gajno de la venko de la Longa Marŝo.

En oktobro de 1936, la tri ĉefaj fortoj de la Unua-fronta, Dua-fronta kaj Kvara-fronta Armeoj kuniĝis en Hujning. Baldaŭ ili faris batalon en Ŝanĉengbu kaj ekstermis unu divizion de la trupoj de Hu Zongnan kaj venke finis la Longan Marŝon. De tiam nia armeo kompakte unuiĝis sub la ĝusta gvidado de la Centra Komitato de la Partio kun kamarado Maŭ Zedong kiel la estro kaj bataladis por efektiviĝi la partian politikon de la Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto kaj renkonti la alvenon de alta tajdo de rezistado kontraŭ la japana agreso.

Retrorigardante la tutan procezon de la Longa Marŝo, ni povas klare vidi, ke la Longa Marŝo estis venke plenumita nur post plena korekto de la "maldekstra" linio kaj starigo de la gvido de la ĝusta linio de kamarado Maŭ Zedong, kaj nur dank' al firma batalo kontraŭ la dekstra oportunisma linio kaj splita intrigo de Ĝang Guotaŭ kaj persisto en la ĝusta opinio de kamarado Maŭ Zedong.

Ni povas vidi ankaŭ, ke nur la longe provita revolucia strategia penso de kamarado Maŭ Zedong pri kombino de Marksismo-Leninismo kun la ĉina realo estas la unika ĝusta gvida penso de la ĉina revolucio. Nur ĝi povis doni senkompare fortan vivipovon al la ĉina komunisma movado kaj doni ĉionvenkan batalan forton al la revolucia armeo. Kaj nur ĝi povis gvidi la Ruĝan Armeon mirakle venki ĉiajn malfacilojn, plenumi la Longan Marŝon kaj iri al nova venko.

La Longa Marŝo proklamis per feraj faktoj, ke la ĉinaj komunistoj armitaj per Maŭzedong-penso estas nevenkeblaj.

* *Jehe-provincio estis nuligita en 1955 kaj ĝia teritorio estis donita al Hebej, Liaŭning kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.*

LAŬ TONG:

Kiel Pekino solvas la problemon de loĝdomoj

EN la lastaj jaroj iuj el niaj legantoj en Eŭropo, Ameriko, Novzelando, Aŭstralio kaj Japanio skribis al ni kun propono ke nia gazeto prezentu, kiel status la loĝado de niaj urbanoj kaj kiel ni solvas tiun problemon. Iuj el ili skribis, ke eĉ en fame konataj urbegoj de kapitalismaj landoj kun prospera industrio ekzistas malriĉulaj kvartaloj akre kontrastantaj kun tiuj de riĉuloj. Tie altaj lupagoj por loĝejoj fariĝis pezega ŝarĝo al multaj urbanoj, kiuj vivtenas sin per salajroj. Laŭ peto de la legantoj mi intervjuis respondeculon de la pekina domadministracio kaj havis kun li jenan interparolon:

Bonvolu iom paroli pri la ĝenerala stato de loĝado de niaj urbanoj.


En Ĉinio estis antaŭe popoldiro: “La kampoj de la riĉaj etendiĝas tre tre vaste, dum la mal-

riĉaj eĉ ne havas pingloptan lokon.” En la malnova Ĉinio la malmultaj imperiistoj, kompradoroj, kapitalistoj, domposedantoj kaj burokratoj de la reacia registaro de Kuomintango loĝis en luksaj domegoj kaj vilaoj kaj vivis di-boĉan vivon, dum la laboranta popolo, kiu konsistigis la plej grandan parton de la loĝantoj, sinpreme loĝis en malnovaj domoj kaj eĉ en malvastaj humidaj teraj kabanoj kaj pajlaj budoj ne povantaj ŝirmi kontraŭ vento kaj pluvo. Tiam la lupago de loĝdomo okupis 20-35% de la tuta enspezo de ordinara laboristo aŭ oficisto. Multaj domluantoj estis elpelitaj de dommastroj pro neakurata lupago kaj devis tranokti sur stratoj. Ankaŭ instruistoj, oficistoj kaj intelektuloj de la meza kaj suba tavoloj ofte devis multe klopodi pro la lupago kaj kelkfoje ili nur povis lombardi aŭ vendi siajn havaĵojn.

Novaj loĝdomoj en Pekino



*Laboristaj loĝdomoj
de la Pekina Ĝenerala
Petrol-kemia
Fabriko*



Nun tiu malracia tragika stato de loĝado jam tute ŝanĝiĝis. Nia lando estas disvolviĝanta lando kun malforta ekonomia bazo, tamen post la Liberiĝo, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, dank' al diligenta klopodado de la laboranta popolo, ni ne nur riparis kaj rekonstruis ekzistantajn malnovajn domojn, sed ankaŭ konstruis multajn novajn domojn, per kio ni fundamente solvis la problemon de loĝado de la urbanoj. Nun rimarkinde pliboniĝis la kondiĉoj de vivo kaj loĝado de la urbanoj.

Kiel oni faris socialisman reformon rilate al la privataj loĝdomoj?

Post la Liberiĝo, la nova Ĉinio konfiskis la domojn de burokrata kapitalo de Kuomintango, likvidis spekuladon per domoj kaj iom post iom abolis ekspluatadon de dommastroj per alta lupago. En 1956 post kiam la ŝtato faris socialisman reformon al kapitalismaj industrio kaj komerco, ĝi praktikis politikon de partopaga aĉeto de privataj porluaj loĝdomoj por iom post iom ilin ŝtatigi. Tiu historia tasko estis finplenumita en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Nun escepte de tre malmultaj urbanoj kiuj posedas domon por sia loĝo, ĉiuj urbanoj luas loĝejon de la ŝtato.

Kia estas nia politiko pri lupago por domoj?

Nia politiko pri lupago estas "flegi la domojn per la lupagoj". En nia lando la lupago por domoj estas tre malalta, ĉar la luigo de domoj celas ne profiton, sed kontentigi la bezonon de la popolo. La lupagoj iom diferencas inter si pro la malsameco de plankareo kaj kvalito de domoj. Laŭ statistiko, la lupago konsistigas nur 3-5% de

la tuta enspezo de la familio de laboristo aŭ oficisto. Laŭ difino de la ŝtato la lupago estas uzata nur por flegi la domojn kaj novaj domoj estas konstruitaj per aparta investo de la ŝtato.


Kiel iras la konstruado de novaj loĝdomoj en Pekino post la Liberiĝo?

Konforme al la disvolviĝo de la urba konstruado kaj la kresko de la loĝantaro kaj por paŝon post paŝo plibonigi la loĝadon de la popolo, la ŝtato ĉiujare donas grandan monsumon por konstrui novajn domojn. Tio estas radikala rimedo por solvi la problemon de urba loĝado. Ekde la liberiĝo de Pekino en 1949 ĝis la fino de 1975 la plankareo de nove konstruitaj loĝdomoj en Pekino estas 1.6-oblo de la totala plankareo de la domoj en la komenco post la Liberiĝo.

La relative grandaj fabrikoj, minejoj, entreprenoj, ŝtataj oficejoj kaj altaj lernejoj konstruis loĝdomojn por siaj laborantoj sub la unueca plano de la koncernaj unuoj de la ŝtato.

Kion oni unue konsideras antaŭ konstruado de loĝdomoj?

La nova Ĉinio estas socialisma lando kaj la konstrua industrio estas entreprenata de la ŝtato. Ĝi diferencas de la domkonstruado de monopolaj kapitalistoj en la kapitalismaj landoj. Ĉar nia konstruado de loĝdomoj estas ne por ĉasi altan profiton, sed plenumi la bezonon de la popola vivo, la konstruado de loĝdomoj estas planita unuece kaj kun plena zorgo pri la bono de la popolo. Ekzemple novaj loĝkvartaloj estas ordinare konstruitaj proksime de la laborlokoj de laboristoj kaj oficistoj por evitigi al ili trafikajn



ĝenon, kaj samtempe oni lokas loĝdomojn en certa distanco kun fabrikoj kaj minejoj por evitigi aeran malpurigon kaj bruadon al la loĝantoj.

Kiajn karakterizaĵojn havas la novaj loĝdomoj konstruataj en la lasta tempo en Pekino?

Novaj domblokoj estas konstruataj grupojn post grupoj. Ni prenu la lokon ĉirkaŭ la parko Ĉiela Altaro kiel ekzemplon. Antaŭ la Liberiĝo la loko estis dense loĝata de malriĉaj laboruloj. Post la Liberiĝo la ŝtato konstruis tie multajn novajn domojn, kiuj multe ŝanĝis la aspekton de la loko. Aŭtune de 1975 nova loĝkvartalo aperis sude de la parko kaj la urbanaj ĝojplene enloĝiĝis en la novajn domojn.

La loĝkvartalo okupas 9 hektarojn da tero kaj konsistas el 30 domblokoj 4-6-etaĝaj. La totala loĝebla areo superis 80,000 kvadratajn metrojn. En la fronto de la loĝkvartalo estas nova pavi-

mita strato Binhe kun longeco de pli ol unu kilometro kaj kontraŭe estas suda ĉirkaŭurba rivero borderita per plorsalikoj.

Plejparto de la domoj konstruitaj post la Liberiĝo estas provizitaj per kranakvo, elektro, radiatoro kaj necesejo. En ĉiu loĝkvartalo estas vendejoj de manĝaĵoj kaj grenoj, kuracejo, bicikloparko kaj aliaj publikaj servoj. En la centro de nemalmultaj loĝkvartaloj troviĝas magazeno, kinejo, poŝtoŝtanco, mondeponejo, hospitalo, infanĝardeno, meza kaj elementa lernejoj, proviza stacio de likvigita petrolgaso k. a.

Kun rapida disvolviĝo de urba konstruado oni komencis konstrui 12-etaĝajn domblokojn anstataŭ 4-6-etaĝajn ekde la pasinta jaro.

Kian principon oni observas en domadministrado kaj kian taskon ĝi havas?

Same kiel en aliaj urboj, en Pekino la domadministrado servas al la laboranta popolo. Tiun

Loĝdomoj de la loĝkvartalo Dongdaciaŭ



principon plene enkorpigis la principo "flegi la domojn per la lupagoj". Krom kolektado de lupago la koncernaj ŝtataj domadministracioj respondecas ĉefe pri riparado kaj administrado de domoj kaj domkonstruado estas zorgata de ŝtata konstrua fako. La Pekina Domadministrativa Buroo havas siajn filiojn en diversaj partoj de la urbo, kiuj havas krom administrajn laborantojn ankaŭ po centojn da masonistoj, ĉarpentistoj, elektristoj, kalkistoj, tubistoj kaj vitristoj por zorgi riparadon. Ĉiujare ili laŭplane pririgardas domojn kaj ellaboras planon de riparado. Antaŭ pluva sezono kaj vintro ili faras apartan esploron por garantii ke la domoj estu taŭgaj por rezisti kontraŭ frosto kaj pluvo. Se okazas perturbo en provizado de akvo kaj elektro kaj funkcio de radiatoroj, la loĝantoj ricevas senpagan riparadon post sciigo al koncerna fako. Samtempe estas ankaŭ amasa domadministrativa grupo kun partopreno de domluantoj kaj profesiaj laborantoj por zorgi tiun laboron.

Kiel oni prizorgas kaj riparas malnovajn domojn?

Pekino estas antikva urbo. De kiam Liaŭ-dinastio (916-1125 p. K.) starigis ĉefurbon tie, ĝi jam trapasis la dinastiojn Juan, Ming kaj King kaj havas historion de ĉ. 800 jaroj. En la lastaj pli ol cent jaroj Ĉinio multe suferis de invadoj de imperiismaj landoj, de interbatalado de militaristoj kaj pezegaj impostoj altruditaj de la kuomintanga reaktiva registaro, kaj la vastaj popolamasoj vivis en abismo de suferoj. Plejparto de la antaŭaj civitanaj loĝdomoj en Pekino jam kadukiĝis. Post la Liberiĝo ni faris enketadon pri la domoj kaj trovis, ke plejparto de ili estas

konstruitaj en King-dinastio kaj iuj eĉ en Ming-dinastio. Pro longtempa uzado ili devis esti riparitaj aŭ rekonstruitaj. En la pasintaj pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo, ni faris multajn laborojn en domriparado laŭ instrukcio de la Partio "garantii sekurecon kaj plibonigi la loĝkondiĉojn".

En la lastaj 3-4 jaroj ni aplikis la metodon malkonstrui malnovajn domojn kaj konstrui novajn terpecon post terpeco. Ekzemple la novaj loĝkvartaloj sude de la parko Ĉiela Altaro, ĉirkaŭ Longtanhu kaj Ginjuĉi estas konstruitaj tiamaniere.

Kiel la domadministracioj distribuas domojn?

En nia lando la loĝdomoj en urboj apartenas al la ŝtato kaj la ŝtato distribuas domojn al uzantoj laŭ ilia bezono. Oni petas domojn ordinaraj pro geedziĝo, plimultiĝo kaj plenkreskiĝo de infanoj. Ĉiu, kiu bezonas domojn, povas prezenti peton al la koncerna administracio kaj la lasta distribuas laŭ la peto kaj la konkretaj kondiĉoj.

Ĉar nia lando estas ankoraŭ unu el la disvolviĝantaj landoj kaj la ekonomio ne estas tiel forta, tial la loĝado estas konsiderinde limigita de la objektivaj kondiĉoj. Kvankam ni ĉiujare konstruis novajn domojn kaj riparis malnovajn, tamen kun pliboniĝo de la popola vivo ankaŭ la bezono pri domoj ĉiam kreskas. Nun familio kun 4 membroj (geedzoj kaj du infanoj) povas lue ordinare duĉambran apartementon. La nivelo do estas ankoraŭ nealta. Tamen ni decidis kun memfido pliapaŝe plibonigi kaj levi niajn loĝajn kondiĉojn per nia diligenta laborado sub la gvido de la Partio kaj la popola registaro.



Laboristaj loĝdomoj de la Ĉefurba Ŝtala Kompanio

La loĝantoj — mastroj de la loĝdomoj

— Pri la dom-administraj grupoj de
amasoj en Niugie-loĝkvartalo

KIEL oni administras la loĝdomojn en la urboj de la nova Ĉinio? Ĉi-sube ni prezentas al niaj legantoj kelkajn detalojn pri la domadministraj grupoj de amasoj (DAGA) en Niugie-loĝkvartalo de Hjuanvu-distrikto, Pekino.

Niugie-loĝkvartalo ampleksas plurajn stratojn kaj stratetojn, kie troviĝas pli ol 24,000 ĉambroj kun planksurfaco de pli ol 365,000 kvadrataj metroj. Escepte de la domoj ambaŭflanke de la stratoj, okupitaj de butikoj kaj metiejoj, ĉiuj aliaj servas kiel loĝejoj de civitanoj.

ELMETO DE LA PROBLEMO

Por administri tiujn domojn, la Domadministracia Oficejo de la Revolucia Komitato de Hjuanvu-distrikto starigis tie domadministran stacion, sub kiu la tuta loĝkvartalo estas dividita en dek parcelojn, al kiuj estas respektive destinita unu administranto kaj unu dom-flega kaj -ripara grupo el ĉarpentistoj, masonistoj, lakistoj, elektristoj, vitristoj kaj tubistoj.

Por la administranto kaj la dom-flega kaj -ripara grupo ĉirkaŭ dudek-persona, prizorgi pli ol 2,000 ĉambrojn estas tasko sufiĉe peza, precipe en pluva sezono aŭ vintro, ofte montriĝas malsufiĉo de laborfortoj. Rilate al distribuo kaj reguligo de loĝĉambroj la afero estas aparte komplika. La administranto devas dediĉi grandan energion al tiu laboro, por ke el tio ne rezultu malracia distribuo aŭ malkontentiga reguligo.

En printempo de 1971, kiam la Granda Proleta Kultura Revolucio jam akiris grandajn sukcesojn, leviĝis la postulo, ke ĉiuj laboroj estu farataj sur nova nivelo kaj la proleta revolucia linio de la Partio estu komplete plenumata sen ia devio. La partia filio de la dom-administracia stacio en Niugie elmetis al la tuta personaro por diskutado la problemon: Kiel plibonigi la administradon de la domoj?

Iu diris, ke la domoj apartenas al la ŝtato, do ankaŭ al la popolo, kaj la popolanoj mem estas loĝantoj en la domoj. Por pli bone fari nian laboron necesas plenumi la amasan linion de la Partio. Oni devas fidi la amasojn kaj sinapogi sur ili. Sinapogo sole sur la profesiuloj sed ne sur la amasoj estas simila al marŝado per sola kruro.

Kaj tiu citis la vorton de Prezidanto Maŭ: **“La urboj jam apartenas al la popolo, ĉio devas preni tiun spiriton kiel elirpunkton, ke la popolo mem respondecu pri la administrado de la urboj.”**

Post ripetada studo kaj diskuto pri la instrukcio de Prezidanto Maŭ, fariĝis pli klara la koncepto, ke la vasta loĝantaro estas la mastroj de la loĝdomoj kaj la profesiaj administrantoj estas nur la servantoj de la popolo, kiuj devas pli firme starigi al si la penson servi al la popolo tutanime kaj plenkore por pli bone plenumi sian administran laboron fidante la amasojn kaj sinapogante sur ili.



Avino Ĝang Juking (la dekstra) vizitas loĝantojn.

“LA LOĜDOMOJN NI MEM DEVAS PRIZORGI!”

En februaro de 1971, nelonge post la Printempa Festo naskiĝis en Niugie la domadministrataj grupoj de la amasoj — novaĵo tiranta multan atenton.

Tiuj grupoj konsistas el domadministranto, estro de la loĝantara komitato kaj 5-9 reprezentantoj de la loĝantoj. DAGA respondecas pri la gvidado de la laboroj domadministrataj en sia loĝ-parcelo sub la gvidado de la domadministrata stacio. La loĝantoj elektas delegiton laŭ la grupiĝo de kortoj por komuniki laŭbezone dezirojn kaj opiniojn de la loĝantoj al DAGA. Tiamaniere la domadministrataj laboroj strikte ligiĝas kun la vasta loĝantaro.

La vasta loĝantaro elmontris grandan fervoron dum la diskutado pri starigo de DAGA. Ili diris: “La domoj estas posedaĵo de la ŝtato, kies mastroj ni estas. Ni devas mastrumi kaj mastrumi bone la loĝdomojn!”

Kial la loĝantoj estis tiel aktivemaj kaj respondemaj? Tio havas kaŭzojn.

AMARAJ MEMOROJ

Antaŭ la Liberiĝo, la reakcia kuomintanga registaro sciis nur kruele subpremi kaj ekspluati la popolon, sed neniam zorgi pri ilia loĝado, por

ne paroli pri solvado de loĝdomaj malfaciloj por ili. Tiam nur grandaj burĝoj kaj entreprenistoj konstruigis por si domojn, kaj ties celo estis nur akiro de profitegoj. La luprezoj estis tre altaj, kaj oni cetere devis pagi garantian sumon al la luiganto kaj honorarion al luperanto. La laboruloj kaj instruistoj, komizoj, subaj ŝtataj oficistoj kaj aliaj intelektuloj el meza kaj suba tavolo ofte devis akcepti la lupago-kolektantojn de la dommastroj tuj post la ricevo de siaj salajroj, ĝuste kiel Marks kaj Engels diris en *La Manifesto de Komunista Partio*, “**Se la ekspluatado de la laboristoj fare de la fabrikanto estas jam tiom finita, ke li ricevas sian salajron kontante pagitan, tiam superfalas lin la aliaj partoj de la burĝaro, la domposedanto, la butikisto, la garantiaja pruntedonisto ktp.**”

La laboristaj amasoj kaj vasta suba urbanaro en la malnova duon-feŭda kaj duon-kolonia Ĉinio vivis pli mizeran vivon kaj spertis multe pli da malfaciloj ol la laboristoj, instruistoj kaj etoficistoj en la kapitalismaj landoj.

La nun pli-ol-60-jara avino Ĝang Jukin, kiu estas estrino de la loĝantara komitato de Kigingstrateto kaj membro de DAGA, loĝis dum sia juneco kun sia edzo — rikŝisto kaj moke nomata “dupieda ĉevalo” — en kaduka kabano sur tiu strateto. Foje ŝi trovis ke ilia kabano jam estis baldaŭ falonta, kaj ŝi iris peti la domposedanton pri riparo. Sed tiu respondis malafable: “Mi ne havas monon por tio. Se vi timas, iru serĉi pli bonan loĝejon! Se vi tamen volas loĝi, ĉesigu vian grumbladon!”

Tiam ŝia edzo ĉiutage povis perlabori monon sufiĉan nur por aĉeti 2-3 litrojn da milio kaj ŝi mem povis gajni per kudrado nur tiom, kiom egalas la koston de duonkilogramo da milio. Kaj la geedzoj havis ankoraŭ du infanojn, unu sesjara kaj la alia kvinjara, kiuj devis helpi la familion per almozpelado; kaj la kvar aliaj jam pli frue mortis de malsato. De kie ili povis havigi monon por transloĝi? Ili do povis nur vivi en la disfalonta kabano timante malfeliĉon en ĉiu momento. Kelkajn tagojn poste, en pluva nokto, la posta flanko de la kabano falis. Ili eskapis morton, dank’ al tio ke ili kuŝis en la antaŭa flanko.

Foje antaŭ la Liberiĝo laboristo Ĝang Deguj, kiu loĝas nun emeritiĝinte en la domo kie troviĝas ankaŭ la loĝantara komitato de Niugie, estis elpelita el sia luita loĝejo, ĉar la posedanto de la domo forvendis ĝin. Ĝang Deguj povis nur prepari por si kabanon per kelkaj eluzitaj matoj ĉe strato, servantan kiel tranoktejon de lia familio.

En tiuj pasintaĵoj la maljunulino Ĝang Juking konkludis emociite: "Tiam la loĝado estis simple sufero por la laboruloj!" Estas neeble finrakonti la amarajn travivaĵojn en la malnova socio.

La laboruloj, kiuj travivis malfacilajn tempojn, ne povas ne ĵaluze gardi sian rajton pri domadministrado, kiun la ŝtato nun donas al ili.

LA FORTOJ DE LA AMASOJ

Sub ĉiu el la 23 loĝantaraj komitatoj de Niugie-loĝkvartalo estis starigita DAGA en printempo de 1971. Tute novan aspekton ekhavis la domadministrataj laboroj.

De junio ĝis aŭgusto en la nomita jaro, la loĝantoj sub la loĝantara komitato de Hiaŭsigie en la loĝkvartalo de Niugie laboris pli ol 4,000 personfojojn por ripari kaj rekalki la loĝdomojn interne kaj ekstere, tiel ke la loko fariĝis ankoraŭ pli pura kaj pli bone ordigita.

En la sekvanta jaro pli ol 1,200 ĉambroj en Niugie estis relakitaj. La laboron partoprenis, krom la profesiaj lakistoj de la domadministracia stacio, la loĝantoj mem, kiuj ofte fervore eklaboris tuj post hejmenreveno de siaj fabrikoj, oficejoj aŭ lernejoj. La dommastrinoj ankaŭ venis labori energie kun diversaj instrumentoj, formante grandan laborforton.

De la jaro 1971 ĝis oktobro de 1975, la loĝantoj per pli ol 65,900 personfojoj partoprenis la laborojn de murkalkado, pordo- kaj fenestro-lakado, plibonigo de akvoduktoj, tegmentripado, pavimado de plankoj. La plenumita laboro konsistis el la fosado de pli ol 20,000 metroj da tub-kondukejo, la lakado de pli ol 4,300 pordoj kaj fenestroj kaj la reordigo de la eksteraĵo de pli ol 2,700 ĉambroj.

La fizionomio de Niugie-loĝkvartalo fariĝas pli plaĉa kaj la loĝkondiĉoj plu pliboniĝis.

La distribuado de loĝejoj estas tre grava flanko de la administrado de loĝdomoj.

Kun la senĉesa disvolviĝo de la urba konstruado, la iom-post-ioma pliboniĝo de la popola vivo, la kreskado de la loĝantaro kaj la starigo de novaj familioj de junaj geedzoj, la bezono de urbanoj pri loĝejoj pligrandiĝas jaron post jaro. Por solvi tiun problemon la fundamenta rimedo estas kompreneble konstrui novajn loĝkvartalojn. Ekde la Liberiĝo la ŝtato jam faris multon en tiu rilato, sed tio ankoraŭ ne povas kontentigi la ĝeneralan postulon. Kion fari?

La DAGA de Niugie apogas sin sur la vasta loĝantaro por plene informiĝi pri la aktualeco de ĉies bezono kaj diferencigas inter la pli kaj la malpli urĝa por racie reguligi la distribuon de loĝejoj kaj bone solvi la demandojn.

De 1971 ĝis 1974 la loĝejoj demandoj de 1,010 familioj estis solvitaj per reguligo, interŝanĝo kaj distribuo. Multaj homoj disvolvis klasan amikan spiriton kaj meminciate cedis siajn superfluajn ĉambrojn al la bezonantoj.

Dank' al la efektiveco de la amasa linio kaj la organizado de la vasta loĝantaro por mem administri la loĝejojn, la domadministrata laboro en Niugie surhavis tute novan fizionomion kaj glate iras la laboroj de riparado, flegado, distribuado, reguligado de loĝdomoj kaj aliaj. La loĝeja problemo ne estas simple problemo de loĝejoj. En sia verko *Pri Dommanko* Engels diris: **"La tiel nomata dommanko, kiu nun ludas tiel grandan rolon en la gazetaro . . . ne estas io aparta al la nuna tempo. Tio eĉ ne estas unu el la suferoj apartaj al la moderna proletaro kontraste al ĉiuj pli fruaj subpremataj klasoj. Male, ĉiuj subpremataj klasoj en ĉiuj periodoj suferis pli malpli egale de tio. Por meti finon al tiu dommanko estas nur unu rimedo aboli entute la ekspluatadon kaj subpremadon fare de la reganta klaso al la laboranta."**

La grandan socialisman aktivecon de la vasta loĝantaro de Niugie por administri la ŝtatan posedadon estigis la socialisma reĝimo de nia lando. Sub la diktaturo de la proletaro, ne plu estas malfacile solvi sociajn bonstatigajn aferojn, inkluzive la dommankon.

Ĉina Eldono de "Matematikaj Manuskriptoj" de Marks

"Matematikaj Manuskriptoj" de Marks estis antaŭ nelonge tradukita en la ĉinan lingvon kaj eldonita unuafoje de la Popola Eldonejo.

La kolekto estas redaktita kaj tradukita el la germana lingvo de speciala redakta kaj traduka grupo de la Pekina Universitato kaj enhavas plejparton de la tezoj de Marks pri diferencialo kaj integralo kaj notoj pri baza matematiko el liaj matematikaj manuskriptoj.

La matematikaj manuskriptoj de Marks estas parto de la trezorejo de marksisma literaturo kaj brila ekzemplo pri apliko de materiala dialektiko en esplorado de naturaj sciencoj. La eldono de la matematikaj manuskriptoj en la ĉina lingvo de Marks havas gravan signifon por studi kaj posedi la naturan dialektikon, kritiki ideismon kaj metafizikon en sfero de naturaj sciencoj, precipe en tiu de matematiko, kaj okupi tiun kampon per marksismo.



DISKA KALENDARO POR TROVI LA DATOJN EN LA ĈINA KAJ LA GREGORIA

Juna sciencisto Li Tiansi de la Ziginŝan-a Observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj elfaris diskan kalendaron per kiu oni povas facile kaj rapide trovi la respondan daton de unu por alia inter la ĉina kaj Gregoria kalendaroj.

Por miloj da jaroj Ĉinio uzis sian propran kalendaron, en kiu la jaro, monato kaj tago estas nomitaj per kombinoj de du vortoj, laŭvice kaj cikle elprenitaj unu el *tiangan* (el 10 vortoj) kaj alia el *diĝi* (el 12 vortoj). La ciklo donas sesdek diversajn kombinojn, kiam unu ciklo finiĝis, komenciĝas nova, kaj tiel daŭras ciklo post ciklo. Sed kiam oni ordigas nun la riĉajn ĉinajn antikvajn literaturojn, leviĝas la tre ĝena tasko turni la datojn

tiel skribitajn en tiujn de la mond-vaste uzata Gregoria kalendaro. La menciita kreaĵo de Li Tiansi helpas rapide kaj ĝuste plenumi tiun taskon eĉ en pli granda tempoamplekso ol la ekzistantaj referencaj libroj povas. La kalendaro konsistas el tri diskoj el kartono (aŭ metalo aŭ plasto) turneblaj ĉirkaŭ komuna centro. Por trovi la deziratan respondan daton de unu al la alia kalendaro, oni bezonas nur turni la diskojn al difinitaj pozicioj.

La diska kalendaro multe faciligas la laborojn en esplorado de ĉinaj antikvaj kalendarsistemo kaj historiaj materialoj pri hidraŭliko, meteologio, arkeologio, fenologio, sismologio k.a. kaj precipe de la esplorado pri la astraj fenomenoj de suneklipso, luneklipso, falstelo, kometo, novaĵo, k.a. registritaj en ĉinaj antikvaj literaturoj.

DU NOVAJ KONSTRUAĴOJ SUR LA TIANGIN-PUKOŬ-A FERVOJO

Lastatempe oni finkonstruis novan ponton kaj novan varstacion sur la grava fervoja linio, liganta la nordon kun la sudo de Ĉinio.

La nova ponto por du trakoj estas konstruita super Huajhe-rivero, kaj ĝia longeco estas 1169.6 metroj. La ponto havas 28 arkojn. La nova varstacio estas konstruita en urbo Bengbu. La tereno de la stacio longas 5 kilometrojn kaj havas 40 trakojn por alveno kaj starto kaj manovrado de vagonoj. Ĉiuj signaloj kaj komutiloj estas elektre manovrataj. Dank' al funkcio de la du konstruobjektoj faciligis la laboro de la laboristoj kaj duobligis la kapablo de vartransportado.

(Daŭrigota sur p. 47)

Riĉa baseno Turpan

Multe esperigas la longfibraj kotonplantoj.



Turpan-baseno kuŝas en la orienta parto de la Ĥingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Ĝi estas interna baseno malalta meze kaj ĉirkaŭata de branĉoj de Tianŝan-montaro. La plej malalta loko de la baseno troviĝas je 154 metroj sub la marnivelo, kaj tiu baseno estas la plej malalta fermita regiono de nia lando. Pro tio la klimato de la loko estas tute malsama al tiu de la aliaj lokoj: varmega, sekega kaj ventega, kaj oni nomis ĝin de antikveco "Fajra Lando" kaj "Ventorezervejo".

Antaŭ la Liberiĝo oni tiel priskribis la basenon Turpan: "Se ne ventas, ĉie estas sablo; se ventegas, domoj enteriĝas, fekunda tero forbloviĝas kaj kampoj fariĝas dezertejo." Pro la kruela subpremado kaj ekspluatado fare de la reaciaj registaroj kaj bienuloj, la diversnaciecaj popolanoj tie havis neniom da forto por rezisti kontraŭ naturaj katastrofoj kaj vivis en abismo de mizero.

Post la Liberiĝo, sub la gvidado de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio diversnaciecaj popolanoj kun granda volo suriris la socialisman vojon. Puŝite de la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo, sinapogante sur la kolektiva forto de popolaj komunumoj kaj disvolvante la revolucian spiriton de Malsaĝa Avo kiu translokis montojn, ili multe entreprenis pri akvoutiliga konstruado kaj forstumado por reformi la dezertejon. Nun, larĝa kanalo kondukas de 50 kilometroj fore neĝakvon de Tianŝan-montaro, kaj formiĝis reto de kanalbranĉoj, subteraj kanaloj kaj pumpilputoj. Kaj samtempe venton kaj sablon ŝlisis granda nombro da

Alia riĉa rikolto de greno



Intelekta junulino lernas de veterana kamparano.





Rizkampo ĉe la piedo de la Fajra Monto



protektaj forstozonoj, kiuj ne nur protektas kampojn kaj vilaĝojn sed ankaŭ ebligis pligrandigi la areon de agroj.

Turpan renomiĝas per blankaj senkernetaj vinberoj kaj dolĉaj melonoj. Nun tie multe kreskas ne nur la produktokvanto de vinberoj kaj aliaj fruktoj sed ankaŭ tiu de greno kaj longfibra kotono, eĉ rizon oni komencis kulturi ĉe la piedo de la Fajra Monto kaj dank' al tio multe pliboniĝis la vivo de diversnaciecaj komunumanoj. La nuna Turpan-baseno jam fariĝis bela kaj riĉa oazo en Gobio.

Ĉu vi rememoras la antaŭan dezertejon en tiu loko?




K-do Ĵuzi Turdi, kiun oni nomas kondukanto sur la socialisma vojo

Neĝakvo de Tianŝan-
montaro venas tra kanalo.



Antaŭen plu por brave batali kontraŭ la naturo






La dolĉaj melonoj renomaj tra la tuta lando

Ĝus rikoltitaj vinberoj





Grande rikolto de blankaj senkernetaj vinberoj estis gajnita de Putaŭgoŭ-komunumo en 1975.



Ripozo

De ŝpatoj al kombajnoj

— Vizito al la Hingiang-a Unua Fabriko
de Agrikulturaj Maŝinoj

DE ŝpatoj al kombajnoj estas la proceso de la disvolviĝo de agrikulturiloj de Hingiang en la pasintaj pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo kaj ankaŭ la vojo irita de la Hingiang-a Unua Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj en subtenado al agrikulturo.

Nun multaj popolaj komunumoj kaj ŝtataj agrikulturejoj de ebenaĵoj kaj montregionoj en Hingiang jam efektivigis en malsama grado meĥanizon aŭ duonmeĥanizon de plugado, erpado, rikoltado, draŝado kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktoj. En tiu flanko Hingiang estas inter la avangardaj regionoj de nia lando.

Iuj el la agrikulturaj maŝinoj de Hingiang estas liveritaj de aliaj provincoj kaj urboj kaj la aliaj estas produktitaj en la regiono. La novtipaj kombajnoj tirataj per traktoro, kiujn oni ekuzis en la somera rikoltado de 1975, estas produktitaj de la nomita fabriko. Tiu maŝino estas malgranda kaj malpeza, povas rikolti rapide kaj bonkvalite kaj estas varme bonvenigata de la diversnaciecaj komunumanoj.

Antaŭ la somera rikoltado de la pasinta jaro mi vizitis la nomitan agrikulturilan fabrikon, nun la plej grandan en Hingiang.

Ĝi troviĝas en la sudokcidenta antaŭurbo de Urumĉi. Larĝa kaj rekta asfaltita vojo borderita per verdaj arboj kondukas al la centra parto de la fabriko. Ambaŭflanke de la vojo estas altaj fabrikdomoj viciĝantaj unu post alia. Kiam mi venis en la fabrikon, mi vidis kvanton da brile ruĝaj kombajnoj sur la vojo baldaŭ transportataj al komunumoj por la somera rikoltado.

Iu respondeculo de la fabriko diris al mi, ke laŭ la bezono de agrikultura produktado de

Hingiang ĝi produktas ĉefe plugilojn kvar- aŭ kvin-sokajn, kanalfosilojn, dizelojn, kombajnoj kaj maŝinpartojn de agrikulturiloj tirataj de traktoroj aŭ brutoj. Por pogrande produkti dizelojn kaj kombajnoj tiratajn de traktoroj oni nun streĉe instalas aŭtomatajn produktajn liniojn kaj faras novajn ekipaĵojn.

“Kion agrikulturo bezonas, tion ni produktas.” Tiu diro de laboristoj montris la karakterizaĵojn de la produktado de tiu socialisma entrepreno. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, la laboristoj kaj oficistoj de la fabriko kritikis diversajn erarajn pensojn malutilajn al subtenado al agrikulturo, venkis multajn malfacilojn en produktado, decideme persistis en la ĝenerala linio por disvolvi la nacian ekonomion “preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron” kaj efike subtenis agrikulturon per siaj produktajoj.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, la ĵus fondita agrikulturila fabriko per simplaj ekipaĵoj produktis grandan kvanton da ŝpatoj, pioĉoj, ŝoveliloj kaj aliaj agrikulturiloj por subteni la centojn da miloj da ĈPLA-anoj en kulturado de virga tero kaj diversnaciecajn popolanojn en restarigo kaj disvolvo de agrikultura produktado. Post finplenumo de la kontraŭfeŭdisma Agrara Reformo, Hingiang, same kiel la aliaj provincoj kaj regionoj de la patrolando, suriris la vojon de agrikultura kolektivigo kaj efektivigis agrikulturan kooperigon kaj popolkomunumigon. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ ke “**la fundamenta solvo de la agrikultura problemo estas meĥanizo**”, la laboristoj kaj oficistoj de la fabriko aktive konstruis fabrikdomojn, faris ekipaĵojn kaj produktis grandan kvanton da plugiloj, erpiloj, semiloj, kultiva-

toroj, herbofalĉaj kaj herbokolektaj maŝinoj kaj aliaj mekanikaj aŭ duonmekanikaj instrumentoj de agrikulturo kaj brutobredo.

Tamen la vojo de antaŭenmarŝado ne estas ĉiam ebena. Precipe ĉirkaŭ 1961 sub la influo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki pri entreprenado iuj proponis produkti neporagrikulturajn industriaĵojn, opiniante, ke la poragrikulturajn industriaĵoj estas malkaraj kaj malmulte profitodonaj. Sed sub la gvido de la Partio la laboristoj kaj oficistoj eliminis la ĝenadon de la erara linio kaj persistis en produktado de agrikulturiloj. En la Granda Proleta Kultura Revolucio ili profunde kritikis la reviziisman linion pri “meti profiton en la unuan lokon”, firme starigis la penson tutkore servi al agrikultura produktado kaj rapide disvolvis la produktadon de diversaj agrikulturiloj, precipe de grandaj traktortirataj maŝinoj. Samtempe kun tio rimarkinde plimultiĝis la produktokvanto de akcesoraĵoj de la diversaj agrikulturaj maŝinoj, kiuj estas tre bezonataj en la kamparo, tamen antaŭe estis ne atentataj pro malmulta profitodono. Laŭ statistiko, de 1966 ĝis la unua duonjaro de 1975,


la fabriko produktis pli ol kvin milionojn da maŝinpartoj kiuj superis 80% de la totala produktokvanto post la Liberiĝo.

Estro de la agrikulturila laborejo Liu Fengĝou diris al mi, ke agrikulturila fabriko estas la “serva departemento” de la agrikultura produktado. Ĝi ne nur devas produkti laŭ plano de la ŝtato diversajn agrikulturilojn konforme al la disvolvigo de agrikulturo, sed ankaŭ devas garanti bonkvalitecon de la produktaĵoj kaj ilian ĝustatempan produktadon. Tio estas kono de la laboristoj pri ilia multjara produkta praktiko. Liu Fengĝou estis unu el la unuaj laboristoj de la fabriko kaj poste promociita kiel gvidanto de tiu laborejo. Li diris, ke por senĉese altigi la kvaliton de la produktaĵoj la laboristoj kaj oficistoj ĉiam plibonigas la produktadon per teknikaj renovigoj. Ili ĉiam rigore ekzamenas la produktaĵojn kaj absolute ne permesas nenormalajn produktaĵojn esti liverataj el la fabriko. Foje, la fabriko muntis nombron da kvinsokaj plugiloj kaj trovis dum kontrolado, ke iuj ŝraŭbkapoj de iuj plugiloj ne tiel bone fiksiĝas. Iuj opiniis, ke ne necesas prilabori ilin denove, sed

Novtipaj tirataj kombajnoj



La agrikulturaj maŝinoj baldaŭ transportiĝos en la kamparon.



nur iom pli fiksi ilin. Tamen la laboristoj diris, ke ili preferas sin ĝeni per prilaborado ol lasi plugilojn difektiĝi en uzado. Ili tuj deprenis de la plugiloj tiujn ŝraŭbojn kaj ilin prilaboris de-nove.

La nomita fabriko ofte sendas sian teknikan grupon al kamparo kun novaj produktaĵoj, kiu tie faras provan uzadon de la maŝinoj kaj kolektas opiniojn de komunumanoj por plibonigi la produktaĵojn.

Foje, kiam laboristoj faris rikoltan provadon en iu gubernio per nove produktita kombajno, komunumanoj proponis, ke ili pli grandigu la grenujon de tia kombajno, ĉar la malgranda grenujo povas enteni nur malmulte da greno kaj pro tio oni bezonas multajn laborfortojn por malŝarĝi la maŝinon kaj multajn jutsakojn por enteni grenon. Laŭ tiu propono la laboristoj faris reformon al la maŝino, kaj dank' al tio oni neniigis la supre diritan ĝenon kaj la nombro de malŝarĝantoj por ĉiu kombajno reduktiĝis de 4 al 2.

La Hingiang-a Unua Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj estas granda fabriko plej frue fondita post la Liberiĝo de Hingiang kaj havas relative grandan teknikan forton. Utiligante tiun avantaĝan kondiĉon la fabriko ne nur disvolvas sian

produkton, sed ankaŭ aktive helpas komunumanojn kaj brigadojn en uzado kaj riparo de agrikulturaj maŝinoj. Ĉiujare la fabriko sendas riparajn taĉmentojn de agrikulturiloj, kiuj iras tra ĉiuj montregionoj kaj ebenaĵoj sude kaj norde de Tianŝan-montaro. Ili kaj riparas agrikulturilojn kaj instruas al komunumanoj teknikon. Dum provuzado de novaj maŝinoj en kamparo, ili helpis diversnaciecajn komunumanojn koni karakterizaĵojn, kapablon kaj uzadon, posedi riparan teknikon de la produktaĵoj per teknikaj kursoj kaj manipula demonstrado. Iam ili ankaŭ invitis komunumanojn al la fabriko, por ke ili partoprenu en la tuta procedo de produktado de maŝinpartoj ĝis muntado de produktaĵoj, tiel ke ili scipovis uzi kaj ripari la maŝinojn. Krome la fabriko ankaŭ helpis agrikulturilajn fabrikojn aŭ riparejojn de multaj gubernioj kaj komunumanoj levi teknikojn de forĝado, varma traktado, malvarma prilaborado kaj farado de agrikulturiloj per teknika interŝanĝo kaj fondo de teknikaj kursoj. Dank' al tio iuj gubernioj posedis la teknikon de bulgrafita giso kaj disvastigis sian produktadon utiligante riĉajn krudajn materialojn de siaj lokoj.

Ĉiufoje kiam oni demandis laboristojn kaj oficistojn de la fabriko, kial ili faras tiel multajn

laborojn krom plenumo de ilia produkta tasko, ili ĉiam respondis: "Ĉiuj ĉi tiuj laboroj estas farendaj por ni." Ili opinias, ke bone fari la socialisman agrikulturon estas granda afero de la tuta Partio kaj la tuta popolo. Kaj por efektivi agrikulturan mekanikigon oni devas disvolvi fortojn de la vastaj amasoj. Hingiang kun vasta areo havas grandan perspektivon en agrikulturo kaj ĝi bezonas ĉiam pli multajn agrikulturajn maŝinojn. Se oni dependus en tio nur de kelkaj grandaj fabrikoj kaj provizado de la ŝtato, la bezono ne povus esti plenumita. Oni povas fari agrikulturajn maŝinojn multe, rapide, bone kaj ekonomie, nur se oni persistas en la revolucia spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj kaj samtempa disvolvo de grandaj, mezaj kaj malgrandaj entreprenoj. En tio la grandaj fabrikoj devas plene ludi sian rolon.

La penema luktado de la nomita fabriko en sia disvolviĝo kuraĝigas kaj stimulas la disvolviĝon de guberniaj kaj komunumaj poragrikulturaj industrioj. En 1950, kiam ĵus fondiĝis la fabriko, ĝi havis nur kelkajn malnovajn tornilojn kaj mankis al ĝi krudaj materialoj. La laboristoj do riparis la malnovajn tornilojn kaj elfaris per martelado dekmilojn da ŝpatoj el ŝtalplatoj kun dikeco de 8 milimetroj, kiujn ili deprenis de difektitaj kirasaŭtoj kaj per tio subtenis la kulturadon de virga tero. Poste ili produktis grandan kvanton da plugiloj, erpiloj kaj duradaj kaj dusokaj plugiloj tirataj per brutoj. Ĉar tiam la fabriksdomoj ankoraŭ ne estis finkonstruitaj, la laboristoj do muntis agrikulturilojn sub la ĉielo malgraŭ brula suno aŭ frosta neĝvento. De 1958, konforme al impeta disvolviĝo de agrikulturo kaj brutobredado ili fabrikis grandan kvanton da deksulkaj semiloj, herbofalĉiloj kaj rikoltiloj tirataj per ĉevaloj. Kaj samtempe ili klopodis mem fari maŝinojn por ekipi sian fabrikon. Ĝis 1965 ili jam elfaris tornilojn por farado de dentradoj, krankajn formigajn maŝinojn, dufostajn rabotmaŝinojn, frostajn pregmaŝinojn, forĝmaŝinojn kaj aliajn sume pli ol 80 ilmaŝinojn.

Post la Granda Proleta Kultura Revolucio la totala areo de konstruaĵoj de tiu fabriko estas

pli-ol-60-oblo de tiu de la komenca periodo post la fondiĝo de la fabriko kaj ĝia totala produktovaleto kreskis je pli-ol-70-oblo. Multe pliiĝis la novaj ekipaĵoj produktitaj de ili mem kaj la modernaj ekipaĵoj al ili liveritaj de la ŝtato. Malgraŭ tio la produktado de agrikulturiloj ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la rapida disvolviĝo de agrikulturo. Nun la laboristoj kaj oficistoj daŭre klopodas plenenergie kun la antaŭa revolucia spirito por kiel eble plej multe produkti agrikulturajn maŝinojn. Ekzemple, dum la provfabrikado de la kombajno, ili trovis ke la malnovaj ekipaĵoj kaj teknikoj ne konformis al la produktado de novaj produktajoj, kaj ili venkis la malfacilojn per propraj fortoj.

En la arda revolucia kaj produkta bataloj aperis multaj avangardaj kolektivoj kaj modelaj individuoj en la fabriko. Ujgura laboristo kaj komunisto Harik de la forĝa laborejo estas labormodelo multe laŭdata de la laboristoj. En la pasintaj 20 jaroj li laboris en la fabriko kiel transportisto, varmtraktisto kaj forĝisto. Kion li faras, tion li amas. Li ĉiam frue iras al laboro kaj malfrue iras hejmen kaj bonege plenumas sian laboron. Li ankaŭ meminciate helpas aliajn kaj ĉiuj laŭdas lin kaj lernas de li. La laborejo, kie li laboras, antaŭdate plenumis la produktajn planojn en la lastaj sinsekvaj jaroj.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj la fabriko elkulturis nombron da ujguraj, kazaĥaj, hanaj, hujaj, siboaj kaj manĉuraj laboristoj kaj oficistoj. Nun la nombro de la laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko estas preskaŭ 11-oblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo, inter kiuj tiuj el nacimalplimulto estas 35-oblo. Iuj el ili laboras kiel gvidantoj de la fabriko, laborejoj kaj skipoj. Multaj el ili estis sklavoj antaŭ la Liberiĝo, sed nun laboristoj lertaj en tekniko. Sub la gvido de la Partio la diversnaciecaj laboristoj kaj oficistoj atingis grandan sukceson en subteno al agrikulturo per siaj saĝo kaj laboremaj manoj. Nun ili diligente laboras laŭ la vojo de daŭra revolucio kaj faras ankoraŭ pli grandan kontribuon por rapidigi la agrikulturan meĥanizon de la limregiono de la patrujo.

La pekina junulino inter kazaĥoj

Sur la bela vasta Kejgimki-stepo en la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono vaste cirkulas la emocia rakonto pri la pekina junulino enradikiĝinta sur la stepo.

LA UNUA DIPLOMITO DE UNIVERSITATO ĈE NI

Iun tagon en aŭtuno de 1969, sur Kejgimki-stepo norde de Tianŝan-montaro ĝoje babilis kazaĥaj paŝtistoj en amaso.

Iuj diris: "Studentino diplomita de la brutobreda fakto de la Pekina Agronomia Universitato memvole petis permeson ke ŝi venu al nia brutobreda brigado por fiksloĝiĝo!"

Aliaj diris: "Tiu junulino havas fortan volon. Ŝi estas la unua universitata diplomito, kiu venis al ni. Tio estas nova afero rezultiginta el la granda kultura revolucio."

Ĝuste tiam, ili vidis, ke fore sur la ŝoseo plena de sunlumo aperis junulino kun kaptuko kaj ledzono kaj rapide alproksimiĝis rajdante sur ĉevalo.

La junulino nomiĝas Li Ĝiking. Kiam ŝi studis en la universitato, ŝi jam aspiris pri la paŝtista vivo de frataj naciecoj sur la stepo. Hardita dum la granda kultura revolucio, ŝi decidis preni la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj, kaj iri al Hingiang por dediĉi sin al socialisma konstruado kune kun tieaj frataj naciecoj.

En la jaro 1968 ŝi venis al Hingiang plena de entuziasmo. Kiam ŝi okupiĝis pri fizika laboro en armea agrikulturejo, ŝi foje kondukis ŝafojn al Kejgimki-stepo kun riĉaj herboj kaj belaj akvofluoj. Tie, ŝi vidis la grandiozecon de la nova socialisma paŝtejo kie troviĝis multaj feltodomoj kaj granda nombro da ŝafoj. Ŝi aŭskultis kazaĥajn paŝtistojn rakonti pri siaj su-

feroj antaŭ la Liberiĝo kaj pri la feliĉo hodiaŭa. Ŝi vidis, ke pro manko de teknikistoj la disvolviĝo de la brutobredo ĉi tie ne konformas al la disvolviĝo de la situacio en la patrolando. Ĉio ĉi tio multe maltrankviligis junan Li. Ŝi diris al si mem, ke la ĉinaj junuloj iras al la kamparo por ŝanĝi la postigintan fizionomion de la kamparo kaj paŝtejo, malgrandigi la diferencojn inter la urboj kaj kamparo, inter la intelektaj kaj fizikaj laboroj kaj inter la laboristoj kaj la kamparanoj kaj krei kondiĉojn por paŝo-post-paŝa efektivigo de komunismo, kaj ke ŝia fizik-labora periodo baldaŭ finiĝos, kaj poste ŝi certe iros al paŝtistoj kaj luktos dum sia tuta vivo por disvolvi brutobredadon kaj plifortigi la solidarecon de la naciecoj. Ŝia peto estis sankciita de la partia organizo.

Juna Li rajdante revokis al sia memoro la pasintecon, rigardis antaŭen al la feltodomoj de la paŝtistoj, fojon post fojo vipis sian ĉevalon kaj venis inter la kazaĥajn paŝtistojn, kiuj ŝin bonvenigis kantante kaj dancante.

KRESKADO SUB LA EDUKO DE PAŜTISTOJ

En la jaro kiam juna Li venis, pro manko de loĝdomo ŝi provizore loĝis en la terdometo de la parigejo. Poste, ŝi transloĝiĝis al duonsubtera domo. Por la kazaĥaj paŝtistoj sur la stepo viando estis la ĉefa manĝaĵo, ŝi estis la sola han-a junulino, kaj krome ŝi ne sciis la kazaĥan lingvon. Tial antaŭ ŝi leviĝis akraj problemoj: Se ŝi volis enradikiĝi sur la stepo, ŝi devis ŝanĝi sian kutimon kaj rapide ellerni la kazaĥan lingvon. Kiel severa elprovo tio estis al juna Li, kiu ekde sia infaneco vivis en intelektula familio de la urbo!

Tamen, juna Li opiniis, ke la malfaciloj povas akriĝi ŝian penson. Ŝi diligente kaj pasie studis



Li Ĝiking (la dua de dekstre en la fronta vico) studas kune kun paŝtistoj teorion pri la diktaturo de la proletaro.



Li Ĝiking ekzamenas infanon de paŝtisto.

Marksismon-Leninismon kaj verkojn de Prezidanto Maŭ kaj lernis la noblajn kvalitojn de la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj, kaj per tio ŝi akiris riĉan politikan nutraĵon kaj spiritan forton por venki malfacilojn.

Iun tagon pluvegis, kaj akvo enfluis tra la pordo kaj fendoj de la tegmento en ŝian domon. Tiam la maljuna kazaĥa paŝtisto kaj kompartiano Kiaŭhiaĵi, malgraŭ ke pluv-akvo enfalis ankaŭ en lian propran feltodomon, alrapidis per ĉevalo de malproksime, kaj helpis junan Li elĉerpi la akvon el ŝia domo kaj reordigi la objektojn. Poste li diris emocie: "Infano, kvankam la vivo sur la stepo ankoraŭ estas malfacila, tamen jam miloble pli bona ol tiu en la malnova socio. Ankaŭ estas vero, ke la stepo kun siaj ventego kaj neĝego produktas bonajn ĉevalojn kaj malfacilaj kondiĉoj hardas homojn!"

Post nelonge, alia afero donis al ŝi edukon. Kiam la ŝafoj estis transirantaj al alia paŝtejo maljuna paŝtisto Hazi malsaniĝis. Sed li pensis, ke la du aliaj paŝtistoj ne sufiĉe bone konas la kondiĉojn de la stepo kaj malgraŭ la admono de la gvidantoj li kuraĝe kondukis la ŝafojn al alia paŝtejo, kaj fine li heroe oferis sian vivon survoje. Sciinte tion, Li Ĝiking tre kortuŝiĝis kaj larmante diris kun decidemo, ke se la paŝtisto ne timis morton pro revolucio, ŝi ja ne devas timi malfacilojn.

Konsekvence, sub la edukado de la partia organizo kaj maljunaj paŝtistoj, Li Ĝiking kun obstina volo luktis kontraŭ ĉiuj malfaciloj kaj marŝis antaŭen.

Ŝi entuziasme instruis al du kazaĥaj junuloj la teknikon de arta spermokolektado kaj arta impregno, tiel ke ili baldaŭ povis labori per si mem. Ŝi rompis la malnovan kutimon ne lasi la virinojn fari parigadon, kaj ŝi aktive studis kaj disvastigis la novan metodon. Iufoje, 7 ĉevalinoj fortaj kaj matur-aĝaj ne estis gravedigitaj malgraŭ kelkfoja parigo. Iu diris, ke la ĉevalinoj suferis de "sterileco" kaj intencis forigi ilin kiel netaŭgajn. Tamen juna Li tage kaj nokte observis tiujn ĉevalinojn, faris seriozajn ekzamenojn kaj trovis la eksterordinaran staton de ilia ovolofalo. En ĝusta tempo ŝi aplikis al ili artan impregnon kaj finfine ili gravediĝis.

Ŝi modeste lernis paŝtadon de la paŝtistoj en vento, pluvo, ŝlimo kaj neĝo. Ŝi detale notis la seksardan staton de ĉiu ĉevalino kaj familiariĝis kun la parigaj reguloj de ĉevaloj kaj ŝafoj. Tiamaniere ŝi sukcesis multe plialtigi

la nombron de gravedaj ĉevalinoj kaj la nombron de vivipovaj idoj. Ankaŭ la ŝafoj rapide generis kaj iliaj specioj estis reformitaj. La produktokvanto de lano pligrandiĝis, ĝia kvalito plialtiĝis kaj ĉiam pli kaj pli multe da brutoj, feloj kaj lano estis liveritaj al la ŝtato. En la jaro 1974, tiu ĉi brutobreda brigado estis prijuĝita kiel avangarda kolektivo kaj Li Ĝiking kiel avangarda individuo de Vusu-gubernio en lernado de Daĝaj.

KURACISTINO EN FELTODOMO

Li Ĝiking ofte pensis, ke ŝi faris tre malmultan laboron kompare kun la edukado, kiun ŝi ricevis de la Partio kaj la ŝtato, kaj la prizorgo, kiun al ŝi donis la paŝtistoj. Kion pluan ŝi povas fari por la paŝtistoj?

Vasta estas Kejgimki-stepo kaj dise loĝas la paŝtistoj. Tamen tie sin trovis nur malmulte da kuracistoj, kaj la paŝtistoj ne povis ĝustatempe ricevi necesan helpon de kuracistoj. Li Ĝiking pensis, ke ŝi devas lerni kaj fari tion, kio estas necesa por la paŝtistoj. Ŝi elmetis al la partia organizo la peton, ke ŝi laboru samtempe kiel nudpieda kuracistino, kaj tuj akiris ĝian entuziasman subtenon.

En majo de 1972, ŝi iris lerni en la komunuma sanitarĉejo. Kiam ŝi revenis, ŝi unuflanke studis medicinajn verkojn kaj aliflanke praktikis akupunkturon sur sia propra korpo. Ŝi rapide ekposedis ĝeneralan kuracarton. De tiam ŝia terdomo fariĝis loko kien venis multaj malsanuloj kaj sekve kuracejo de Kejgimki. Ŝi ĉiam akceptis ilin kun entuziasmo boligante laktoteon aŭ varmigante kukojn por ili. Ŝi ofte devis dediĉi kelkajn tagojn al la prizorgo pri tiuj malsanuloj, kiuj venis de malproksime. Ŝi aranĝis por ili loĝejojn kaj manĝadon, kaj zorge faris al ili injektadon aŭ manĝigis al ili medikamentojn. Por mildigi la doloron de la malsanuloj ŝi bone planis la laboron en la parigejo, kaj rondire vizitis la malsanulojn en iliaj feltodomoj por doni medicinan helpon al ili. En printempo de la lasta jaro iu maljuna paŝtisto suferis de tuberkulozo kaj oni devis doni al li injekton en multaj tagoj. Juna Li ĉiam venis en fiksitahoro por fari al li injekton en lia domo, kiu

troviĝis kelkdek liojn for de ŝia loĝejo. Iutage leviĝis granda sablovento kaj la ĉielo malheliĝis. La maljuna paŝtisto pensis, ke juna Li eble ne venos, kaj li pretigis ĉevalon por veturi al ŝi por ricevi injekton. Ĝuste tiam juna Li eniris lian feltodomon kaj ŝiaj vestoj estis tute kovritaj per polvo. La maljunulo diris kortuŝite: "Eĉ la ventego ne povas deteni vin. Vi ja estas bona junulino edukita de Prezidanto Maŭ!" Juna Li diris ridetante: "Tio estas mia devo. La paŝtistoj en malfaciloj des pli bezonas mian servon."

"NENIAM MI FORIROS!"

La profunda ŝanĝo en ŝia penso kaj ŝia radikala rompo kun la malnovaj tradiciaj konceptoj kreskiĝis al Li Ĝiking la penson ke ŝi devas enradikiĝi sur la stepo por ke ŝi pli multe laboru por nacia solidareco.

Kun tiu bona volo ŝi enamiĝis nerimarkite kun ordinara paŝtisto de la brutobreda brigado. Sub la fervora subteno de la partia organizo kaj la kazaĥaj paŝtistoj, ili feliĉe geedziĝis.

En la somero de 1972 la gvidantoj intencis transpostenigi ŝin al la gubernia urbo konsiderante, ke juna Li jam havas infanon kaj la nomada vivo sur la stepo estas malfacila, kaj krome la gubernia urbo bezonis laborantojn. Juna Li estis tre danka pro la prizorgo de la Partio, tamen ŝi sentis ke la stepo pli multe bezonas ŝin ol la gubernia urbo kaj ŝi ne devas foriri de la paŝtistoj. Parolante pri la knabo, ŝi tute ne povis forgesi la delikatan prizorgon de la paŝtistoj. La infano estis akuŝita helpe de kazaĥaj virinoj kaj ĝia nomo "Bahrtul" signifanta "feliĉan brilon" estis donita de Kazaĥaj paŝtistoj kune. Tiu nomo enhavas la bonajn dezirojn kaj la profundan klasan amon de la paŝtistoj. La paŝtistoj emocie diris: "Kresku la infano de Li Ĝiking en nia loko, kaj transdonu de generacio al generacio la solidarecon de niaj naciecoj!"

Pripensante ĉion ĉi tion kaj rigandante la prosperajn florojn sur la paŝtejo kaj la paŝtistojn, kiuj ĉiam helpis kaj edukis ŝin, ŝi diris: "Neniam mi foriros! Ankaŭ la infano ĉiam vivu inter vi."

Juna teknikisto Ĉen Hujbo

ANTAŬ nelonge, la Tajjuan-a Pezmaŝina Fabriko de Ŝanhi-provinco de Ĉinio sukcese fabrikis novan tubrektigan maŝinon. La ŝlosilaj maŝinpartoj, la rektigaj ruliloj, estis faritaj ne laŭ la formuloj de iu fremdlanda "aŭtoritatulo", sed laŭ niaj propraj formuloj kaj grafiko. Ĝi multe altigis la kvaliton de niaj rektigitaj ŝtaltuboj. Estas aparte menciinde, ke la novaj rektigaj ruliloj de la maŝino estas projektitaj de ordinara juna teknikisto Ĉen Hujbo de la nomita fabriko.

Kamarado Ĉen Hujbo havas sunbrunan vizaĝon kaj estas en laborvestoj. Li portas miopajn okulvitrojn, sen kiuj mi simple prenis lin por ordinara laboristo laŭ lia aspekto. Kiam oni gratulis lin pro lia sukceso en la projektado, li diris: "Tio estas frukto de kolektiva esplorado sub la socialisma reĝimo. Sen la gvido de la Partio kaj la fervora helpo kaj subteno de laboristoj, la projektado ne povas sukcesi."

Dum mia intervjuo al li kaj liaj kolegoj mi ne nur konstatis la verecon de liaj vortoj, sed ankaŭ profunde sentis la respektindan revolucionan spiriton de kamarado Ĉen Hujbo, kiu, por glorigi la socialisman patrolandon, kuraĝas elhaki novan vojon kaj surgrimpigi altan montpinton de scienco kaj tekniko, sin kombinante kun laboristoj.

I

En la fino de 1972 Ĉen Hujbo kaj aliaj du kamaradoj de la fabriko estis senditaj al la Fabriko de Senjuntaj Ŝtaltuboj de la Anŝan-a Feraŝtala Kompanio por ekzameni tubrektigan maŝinon faritan de ĝi mem.

La ŝtaltuboj estas produktitaj per varma aŭ malvarma laminatado, kaj ili deformiĝas post

la laminatado kaj nur post kiam ili estas rektigitaj kaj rondigitaj per tubrektiga maŝino ili fariĝas normaj. Sed la ŝtaltuboj prilaboritaj de la antaŭe uzataj tubrektigaj maŝinoj ĉu importitaj aŭ faritaj de ni mem ne estis sufiĉe rektaj nek sufiĉe rondaj kaj iliaj surfacoj surhavas premsignojn kaj frotodifektojn. Granda estis la procento de subnormaj produktajtoj kaj tio portis al la uzantoj multajn malfacilojn. Por ŝanĝi tian staton, la laboristoj kaj oficistoj de la Fabriko de Senjuntaj Ŝtaltuboj mem faris tubrektigan maŝinon.

Dum la ekzamenado Ĉen Hujbo plie konis la malutilon de la nebone rektigitaj ŝtaltuboj al la socialisma konstruado. La nobla spirito de la Anŝan-aj laboristoj ne timi malfacilojn kaj kuraĝi krei novaĵon profunde edukis Ĉen Hujbo. Li decidis fari kontribuon por projekti kaj fabrikigi novan tubrektigan maŝinon.

Ekzamenado montris, ke kvankam la tubrektiga maŝino jam estis multe plibonigita en strukturo, tamen la ŝtaltuboj rektigitaj de ĝi ankoraŭ estis ne tre bonkvalitaj. Nemalmultaj personoj serĉis la kaŭzon en ĝia strukturo, sed Ĉen Hujbo ricevis inspiron de opinioj de laboristoj. Ili diris, ke tro malgranda estas la tuŝsurfaco de la rektigaj ruliloj de la malnova maŝino kontraŭ la prilaborata ŝtaltubo. Post frotado de certa tempo la ruliloj fariĝis eĉ pli taŭgaj en rektigado, kaj altiĝis la kvalito de la rektigitaj ŝtaltuboj. Aŭdinte tion Ĉen Hujbo jetis duban rigardon al la rektigaj ruliloj. Sed iu kamarado diris al li, ke la ruliloj havas hiperbolan surfacon kaj estis projektitaj laŭ la kalkulaj formuloj kaj grafiko de fremdlanda "aŭtoritatulo". Ĉen Hujbo demandis: "Kial la tuŝsurfaco de la ruliloj estas tiel malgranda, ĉu oni povas ŝanĝi la profilon de

la ruliloj por grandigi ĝin?” Iu diris al li: “La fremdlanda aŭtoritatulo ne elkalkulis la racian tuŝlinion inter la prilaborata tubo kaj la rektigaj ruliloj. Verŝajne tio estas tre malfacila, do vi ne cerbumu pri tio!”

Tiuj vortoj levis ondojn en la koro de Ĉen Hujbo, kiu longe ne povis kvietiĝi: Ĉu tion, kion fremdlandano ne povis fari, ankaŭ ni ne povos? Prezidanto Maŭ diris: “**La ĉina popolo havas volon kaj kapablon, kaj nepre atingos kaj superos la avangardan mondan nivelon en nermalproksima estonteco.**” Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio kulturis min en teknikiston, do mi devas havi volon de la proletaro kaj kuraĝi iri la vojon neniam iritan de la antaŭuloj. Ĉar la rektigaj ruliloj post frotado de certa tempo povas pli taŭge tuŝi la surfacon de la prilaborata tubo, tio montras, ke inter ili efektive ekzistas racia tuŝlinio. Laŭ la vidpunkto de dialektika materiismo, la objekte ekzistantaj aferoj estas koneblaj. Pensante pri tio, Ĉen Hujbo plifirmigis sian decidon nepre surgrimpigi la altan montpinton de scienco kaj tekniko malgraŭ ĉiaj malfaciloj.

En 1973 post kiam Ĉen Hujbo revenis al sia fabriko, li raportis sian penson al la partia filio de la projekta fako kaj ricevis ĝian fortan subtenon. Veterana laboristo Ĝang Ĉubi, kiu estas unu el la gvidantoj de la fako en kiu Ĉen Hujbo laboras, estis propramane muntinta tubrektigajn maŝinojn produktitajn de la nomita fabriko. Tiam li jam dubis pri la taŭgeco de la ruliloj. Aŭdinte la raporton de Ĉen Hujbo, li prenis la manon de la lasta kaj emocie diris: “Nun ni pensas pri la samo! Ĉenĉjo, Prezidanto Maŭ montris al ni la vojon kaj la amasoj vin subtenas, do vi agu kuraĝe! Nepre elhaku nian propran vojon!”

Sur la antaŭenmarŝa vojo malfaciloj kaj obstrukcoj estas neeviteblaj. Kiam disvastiĝis la informo pri la studo de Ĉen Hujbo pri rektigaj ruliloj, aŭdiĝis diversaj opinioj. Iuj bonkoraj kamaradoj, kiuj sciis ke Ĉen ne studis pri la fabrikado de laminataj maŝinoj, timis ke li ne povos sukcesi en tio, kaj admonis ke li forlasu la ideon. Iu eĉ mokis: “La teorio de la fremdlanda aŭtoritatulo estas aplikata de multaj



Kamarado Ĉen Hujbo (la meza) interŝanĝas opinion kun laboristo kaj kadro pri nova kurbo de ruli'o de tubrektiga maŝino.

landoj en multaj jaroj, jen malgranda teknikisto eĉ pretendas inventi pli bonan! Kia ridinda revo!”

Sed ĉio tio ne ŝancelis la decidon de Ĉen Hujbo. Tiu ĉi junulo deveninta de malriĉa kamparana familio havas flaman koron kaj neniam povas forgesi la amaron en sia infanaĝo. Post kiam lia hejmloko estis okupita de la japanaj agresantoj, lia patrino estis enkarcerigita de la agresantoj kaj la patro dufoje forkaptita por kulia laboro. En sia knabeco li jam laboris kiel bovpaŝtisteto ĉe bienulo aŭ kulako kaj nun lia korpo ankoraŭ surhavas cikatrojn postlasitajn de la malnova socio. Post la Liberiĝo, la nova socio havigis al li ŝancon studi en universitato kaj nun li laboras kiel teknikisto. Li firme decidis rompi la katenon de fremlanda “rutino”,

memstare projekti kaj fabriki novan tubrektigan maŝinon.

II

Ĉen Hujbo studis en universitato aplikatan mekanikon kaj vere estas laiko en projektado de laminata maŝino. Por fariĝi spertulo li prunteprenis de la biblioteko multajn koncernajn materialojn kaj atente legis ilin. Kiam li renkontis ion malfacile kompreneblan, li faris rekomencan studon paŝon post paŝo. Por referenci librojn kaj materialojn de Germanio, Japanio, Britio kaj Usono, li diligente lernis la lingvojn germanan, japanan kaj anglan, surbaze de lia scio de la rusa lingvo. Li klopodis ĉiamaniere por aĉeti en aliaj lokoj librojn, kiujn oni ne povis akiri en Tajjuan. Ĉen Hujbo vivas tre modeste, sed ne domaĝas monon en libro-aĉetado. En la lastaj jaroj li kopiis multajn librojn, kiujn li prunteprenis, timante ke longa tenado de libroj ĉe li povas ĝeni alies uzadon.

Ekde februaro 1973 Ĉen Hujbo laboris tage kaj nokte en pluraj monatoj. Je la elkrepuskiĝo li jam eniris la fabrikon, kaj en profunda nokto,

kiam oni jam profunde endormiĝis, en lia oficĉambro ankoraŭ brilis lampo, kelkfoje li eĉ ne rimarkis, ke la suno denove lumigis la korton.

En sia diligenta laborado Ĉen Hujbo ricevis subtenon kaj kuraĝigon de la partia filio. Tiam iuj de la fabriko diris ke Ĉen Hujbo estas stulta, iu eĉ diris ke li iras la vojon de burĝa specialisto. La partia filio serioze refutis tiujn erarajn dirojn kaj alvokis en kunveno teknikajn laborantojn lerni de Ĉen Hujbo kaj diligente studi teknikon por la revolucio. La subteno kaj prizorgo de la partia organizo plifirmigis liajn memfidon kaj kuraĝon venki la malfacilojn. Kiam li renkontis malfacile solveblajn problemojn, li do konsultis laboristojn kun praktika sperto kaj teknikistojn, kiuj faris projekton pri la tubrektiga maŝino. Li faris malgrandajn modelojn kaj faris al ili ripetadan komparadon, fine li trovis la difekton en la grafiko kaj kalkulaj formuloj de la fremdlanda "aŭtoritatulo".

Iun sabatan vesperon, kun problemoj prezentitaj de la laboristoj en la produkta praktiko de la rektigaj ruliloj, Ĉen Hujbo kaj komparis la modelojn kaj faris desegnojn en sia oficĉambro.



Ĉen Hujbo (la meza) ekzamenas kune kun laboristoj la rektigitan ŝtalan tubon.

Pro troa laciĝo li revenis al sia dormoĉambro kaj kuŝiĝis en la vestoj. Eĉ tiam li ne ĉesis cerbumi. Subite li kaptis la ŝlosilan punkton, li do ŝaltis la lampon kaj faris desegnojn. Ne povante precize desegni en la dormoĉambro li simple reiris en la oficĉambron. Je la tagiĝo li fine sukcesis tion fari. Tuj poste li desegnis racian kurbon de la ruliloj kaj faris ekvacion de ilia profilo. La problemo pri la teorio de la rektigaj ruliloj estis unuapaŝe solvita.

III

Granda kvanto da kalkuloj pruvis, ke la novaj kalkulaj formuloj estas bonaj kaj la nova kurbo de ruliloj estas racia. Ĉen Hujbo ne haltis ĉe tio. La nova hipotezo devas esti provita en praktiko. Li tuj partoprenis en laboro por fari rulilojn laŭ la nova rulila kurbo. Post streĉa batalo de du monatoj, laboristoj de la Tajjuan-a Pezmaŝina Fabriko elfaris ŝablonon precizegan laŭ komplikaj procedoj. Laboristoj de la Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko elfaris novajn rektigajn rulilojn en du semajnoj.

La labora entuziasmo de laboristoj inspiris Ĉen Hujbo. Li laboras kaj kiel teknikisto kaj kiel helplaboristo. Li ŝultre portis krudan muldaĵon de ruliloj pezan je 50 kg., de unu ilmaŝino al alia, de unu laborprocedo al alia. Vespere reveninte al sia loĝejo li ankoraŭ lernis kaj studis la nove aperintajn problemojn en la produkta praktiko. Post la unua industria eksperimentado, laboristoj plene taksis la avantaĝojn de la novaj rektigaj ruliloj kaj samtempe montris solvendajn problemojn, ke iuj el la rektigitaj ŝtaltuboj ankoraŭ surhavas defrotaĵojn kaj spiralajn premsignojn, kaj kiel oni devas ripari kaj reguligi la frotedifektitajn rulilojn por garantiĝi la kvaliton de la rektigitaj ŝtaltuboj. Ĉen Hujbo modeste aŭskultis opiniojn de laboristoj, profundigis en praktikan laboron kaj faris ripeta-

dajn studojn kaj analizojn kune kun laboristoj, kadroj kaj aliaj teknikistoj. Tio pli perfektigis kaj disvolvis lian konon pri la kurbo de ruliloj kaj fine li solvis tiujn problemojn kontentige. Pro sia modesta kaj diskreta laborstilo Ĉen Hujbo ricevis laŭdojn de laboristoj. Iuj el ili diris ke li estas ilia "propra intelektulo".

En marto kaj aprilo 1975, oni faris duan industriean eksperimentadon al la novaj rektigaj ruliloj. Kvankam la eksperimentado estis farita sur malnova tubrektiga maŝino uzita pli ol 10 jarojn kiel antaŭe, tamen ili akiris pli bonan efikon. La tuŝsurfaco de la malnovaj ruliloj kontraŭ la rektigata ŝtaltubo estas 20%, sed la dua eksperimentado montris, ke tiu de la novaj ruliloj estas preskaŭ centprocenta. La antaŭaj frotodifektoj kaj premsignoj nun estas fundamente eliminitaj. Ĝiaj produktaĵoj jam superis la kvalitajn normojn difinitajn de la ŝtato.

La esplorado sukcesis! Nun la Tajjuan-a Pezmaŝina Fabriko jam komencis fabriki novajn tubrektigajn maŝinojn, aplikante la senĉese plibonigitan kurbon de rektigaj ruliloj. Kaj ankaŭ malnovaj tubrektigaj maŝinoj estas reformataj.

* * *

La ordinara juna teknikisto Ĉen Hujbo, sur la vojo de kombiniĝo kun laboristoj, faris kontribuon por la socialisma konstruado de la patrulando. Sed li ne haltis post la sukceso. Je la fino de mia intervjuo, li modeste diris: "Mi faris nur iom da farena laboro kaj ankoraŭ devas multe klopodi por plenumi la postulojn de la ŝtato kaj la popolo. Por atingi la grandiozajn celojn en modernigo de la agrikulturo, industrio, nacidefendo, scienco kaj tekniko de nia lando, ni bezonas plenumi multajn esplorajn objektojn kaj surgrimpi multajn montpintojn. Mi neniam fieros pro la atingoj kaj neniam haltos sur la vojo!"



Surakva lernejo

LA vasta Honghu-lago estas punktita de fiŝkaptaj velŝipoj, kaj sur unu el ili kun ruĝa flago diligente lernas pli ol dudek infanoj de fiŝistoj sub direktado de juna instruisto. Tio estas la surakva lernejo funkciigata de Tajmahu-fiŝbredejo de Honghu-komunumo, Hubej-provinco. La lernejo fondiĝis post la Granda Proleta Kultura Revolucio.

En la kultura revolucio, la fiŝistoj de tiu loko kritikis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, persistis en socialisma vojo kaj kolektive fiŝkaptadis en ŝiparo formita el produkta grupo aŭ produkta taĉmento. Krom fiŝbrede ili ofte remas tien kie abundas fiŝoj. Dum la lastaj jaroj, senĉesa disvolviĝo de fiŝkaptado multe plibonigis la vivon de la fiŝistoj. Sed ili migradas surakve, kaj estas malfacile por iliaj gefiloj viziti lernejojn, kio malhelpis ĝeneraligon de edukado. K-do Hiaŭ Hinde, sekretario de la partia filio de la bredejo, diris: "Sen kultura armeo oni ne povas konstrui socialismon. Ĝene-

raligo de edukado estas grava afero por kulturindaŭrigantojn de la proleta revolucia afero. Ni nepre devas havigi eblecon al la infanoj de fiŝkapta brigado viziti lernejon proksime." Post interkonsiliĝo, la partia filio de la bredejo decidis funkciigi lernejon sur lago, nome lekciisursipe, kaj k-do Ĝu Ĝenven fariĝis instruisto de la lernejo.

En la tago de inaŭguro de la lernejo multe suferintaj maljunaj fiŝistoj ĉiuj eskortis siajn infanojn al la ŝipo-lernejo. Remante ili admonis al la gefiloj: "Baldaŭ funkcios surakva lernejo. Vi nepre devas bone lerni, por poste daŭrigi la revolucionan aferon." Kun senlima amo al la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la instruisto kaj gelernantoj finis la unuan lecionon per "Vivu la Komunista Partio de Ĉinio! Vivu Prezidanto Maŭ!" kaj la kanto *Ruĝas la Oriento*.

Kamarado Liang Gibing estas unu el la gvidantoj de la partia filio kaj reprezentanto de la



Maljuna fiŝisto Duan Ĉengŝun donas lecionon pri klasbatalo.

komitato pri administro de la lernejo. En la vespero de la tago li kunvokis la lernantojn kaj iliajn gepatrojn por fari komparon inter la nova kaj malnova socioj. Maljuna fiŝisto Duan Ĉengŝun, estro de la Asocio de Malriĉkampanoj kaj Malsuperaj Mezkampanoj de la brigado, elmontris al la lernantoj ĉifonan vatican veston kiun portis tri generacioj de lia familio en la malnova socio, kaj rakontis kiel li suferis siatempe. En la malnova socio fiŝistoj havis nek minimumajn manĝaĵojn nek minimumajn vestojn, por ne paroli pri vizito al lernejo. Ja neniu el la fiŝistoj tiam scipovis legi! La rememoraĵo de k-do Duan multe komprenigis la ĉestantojn ke estas feliĉe por fiŝistoj kaj iliaj posteuloj ke hodiaŭ lernejo funkcias eĉ surŝipe. Ili esprimis, ke ili neniam vanigos la favoron de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Tio estis la unua leciono de klasa edukado sur ŝipo.

Ŝanĝiĝas la sezonoj de fiŝkaptado, kaj konforme al tio ŝanĝiĝas ankaŭ la formo kaj metodo de leciondonado.

Iun matenon, la ruĝa suno saltis de la horizonto kaj la lago trembrilis de oraj sunradioj. Ŝipoj de la fiŝkapta brigado ekveturis suden. Ilin sekvis la ŝipo-lernejo stirata de maljuna Liang. Subite ŝanĝiĝis la vetero, ekventegis kaj ekpluvegis. Onderoj flugis sur la ŝipon kaj la pluveroj trapenetris la ŝirmilon en la kajuton. Forte balanciĝis la instrua ŝipo. Atenteme remante la sperta maljuna Liang admonis al ĉiuj ke ili restu trankvilaj. La aplombeco de la maljuna fiŝisto bone efikis sur la instruisto kaj lernantoj.

En aprilo de la pasinta jaro, la fiŝabunda sezono, la fiŝkapta brigado venis al Dongvan por fiŝkapti. Pli ol 20 fiŝistaj familioj laboris sur spaco de preskaŭ tri km. sur la lago. Komence la fiŝistoj ne estis tiel okupataj. Tiam instruisto Ĝu ankris la instruan ŝipon meze inter la fiŝistaj familioj. La gepatroj sendis siajn infanojn al la lernejo matene kaj revenigis ilin hejmen post la lecionoj. Post kelkaj tagoj, komenciĝis la sezono de fiŝabundo, kaj tiel okupataj estis la fiŝistoj, ke ili ne havis tempon por porti siajn infanojn al la lernejo. Instruisto Ĝu do remis



Leciono

la instruan ŝipon al la hejmoj de la lernantoj por kunigi ilin unu post alia kaj vespere resendis ilin hejmen. Iu lernanto nomata Ĝoŭ Kelin estas lerta helpanto en fiŝkaptado. Dum intensa fiŝkaptado, li helpis la gepatrojn, tial li ne povis viziti la lernejon. Por ke li povu kaj helpi en produktado kaj daŭrigi la lernadon, instruisto Ĝu tiam ĉiutage venis al lia hejmo vespere por helpi lin post kiam ĉiuj lernantoj estis hejmen reportitaj.

En la meza tagdeko de majo, la fiŝkapta brigado laboris en tri grupoj, kiuj distancis unu de alia iom pli ol kvin km. Estis malfacile kunigi la lernantojn. La lernejo decidis, ke ĉiusemajne la profesia instruisto veturu al ĉiu grupo por instruado en du tagoj kaj ĉiu el la tri instruistoj kumulaj prizorgu unu grupon kaj instruu en aliaj du tagoj, kaj en la ceteraj du tagoj la lernantoj mem faru ekzercojn hejme kaj helpu siajn gepatrojn en produktado.

En julio kaj junio, kiam ne estas streĉa fiŝkaptado kaj la fiŝistoj laboras ofte kune, la surakva lernejo instruas do koncentre. Kiam la fiŝistoj lakas ŝipojn kaj riparas retojn surborde, la lernejo funkcias ankaŭ tie. En serenaj tagoj oni

lekciaj en arba ombro kaj en pluvaj tagoj oni lernas sub simpla tegmento de fiŝistoj.

Por praktiki la edukon politikon de la Partio “Eduko devas nepre servi al la proleta politiko kaj nepre kombiniĝi kun produkta laboro”, la surakva lernejo ne nur donas socialismajn kulturajn lecionojn sed ankaŭ ofte petas maljunajn fiŝistojn kaj ruĝgvardianojn rakonti pri la suferoj en la malnova socio kaj la nuna feliĉa vivo, rakonti kiel la revoluciaj antaŭuloj batalis tiam ĉe Honghu-lago, kaj petas fiŝteknikistojn doni lecionojn de fundamenta scio pri fiŝkaptado, por fari la lernantojn kleraj laboruloj kun socialisma konscio. Iun posttagmezon, la instruistoj kaj lernantoj veturis al la mezo de la lago, kaj ili petis vicedstron de la fiŝkaptista brigado kaj kumulan instruiston Li Jugan doni lecionon de fiŝkaptado. “Karpoj havas ĝiban dorson kaj flavan koloron, naĝas profunde kaj ne ŝatas lumon. Dum vintro ili restas en la nesto kaj naĝas ĉien grupe en aprilo, aŭgusto kaj septembro.” Post kiam la lernantoj memlernis la tekston verkitan de la lernejo, la kumula instruisto klarigis ĝin frazon post frazo kaj ankaŭ demonstris al ili kiel ĵeti forkegon al fiŝo kaj kiel meti reton ktp. Tio multe helpis la lernan-

tojn. La 13-jara Caj Baŭgu kaptis pli ol tridek kg. da fiŝoj en unu tago kaj estis laŭdata de fiŝistoj. La lernantoj ellernis ankaŭ la teknikojn de plektado kaj riparado de retoj, plektado de fiŝkorboj kaj bambuaj kurtenoj k.a. En la unua semestro de 1975, la instruistoj kaj lernantoj kune plektis pli ol dek retojn kaj pli ol tridek bambuajn kurtenojn.

La surakva lernejo antaŭenpuŝiĝas tra ondoj kaj pliboniĝas tagon post tago. Subtenate de la supera organizaĵo de la Partio kaj koncerna fako, lastatempe la surakva lernejo aĉetis pli grandan lignan ŝipon por ke ĉiuj lernoagaj infanoj de la tuta fiŝkaptista brigado havu ŝancon viziti lernejon. En la lumo de Maŭzedongpenso, la lernantoj progresas en moralo, intelekto kaj bona sano. Tion vidinte la fiŝistoj ĝojas kore kaj plengorĝe kantas novan kanton de ili mem verkitan:

*Ho, vasta lago Honghu ludas per ondaro,
favoro de l' Parti' profundas kiel maro.
Jen sur fiŝkaptista ŝip' funkcias jam lernejo,
La koro de l' fiŝistoj ĝojas sen komparo.
Generacio nova estas en progreso.
Ni Prezidanton Maŭ sekvados en batalo.*



Fiŝbreda teknikisto instruas fiŝbredadon al la lernantoj.

Bronza spegulo el la dinastio Okcidenta Han eksponata en Ŝanhajo

Lastatempe en la Ŝanhaja Muzeo estis ekspoziciata rara bronza “diafana spegulo” el la dinastio Okcidenta Han (206 a. K. - 8 p. K.), kiu vekis interesigon ĉe ĉinaj kaj fremdlandaj rigardantoj.


La bronza spegulo kun diametro de 7.4 centimetroj kaj pezo de 50 gramoj estis farita antaŭ pli ol 2,000 jaroj. Ĝia surfaco estas glata kaj brila, kaj havas sur la dorso reliefajn ĉinajn ideografiaĵojn signifantajn “La mondo heliĝas en la sunlumo” kun tre delikataj rombaj desegnaĵoj. Laŭ la aspekto ĝi neniom diferencas de aliaj ĉinaj antikvaj speguloj. Tamen kiam sunlumo brilas sur ĝian surfacon, estiĝas stranga fenomeno: La spegulo reflektas sur muron ne nur simplan lumdiskon, sed en ĝi estas ankaŭ la surskribajo kaj desegnaĵoj troviĝantaj sur la speguldorso, kvazaŭ la lumo estus trairinta la spegulon. Pro tio antikvuloj nomis ĝin “diafana

spegulo” kaj iuj eĉ ĝin nomis simple “magia spegulo”.

En historia literaturo de Ĉinio delonge jam ekzistas notoj pri tiaj antikvaj speguloj. La novelo “Pri Antikva Spegulo” el Tang-dinastio (618-907 p.K.) diras: “Reflektante la sunlumon, la spegulo montras ankaŭ komplete la surskribajojn kaj desegnaĵojn sur sia dorso.” La aŭtoro priskribis la spegulon kiel “magian spegulon”, kiu povas forpeli kaj subigi malbonajn demonojn. Tio montras, ke en tiu tempo tia spegulo jam estis io tre rara.


En la 11-a jarcento p. K. oni ekfaris scian esploron pri la sekreto de la stranga fenomeno donata de tiu spegulo kaj la spegulfara teknologio. Ŝen Kuo, fama legalizisto kaj sciencisto, prezentis sian eminentan klarigon pri tio en sia verko. Sur la bazo de siatempa scienca nivelo, li opiniis, ke la fenomenon probable kaŭzas tio,

La fronta flanko de la antikva spegulo



La dorsa flanko





La reflektajo

ke neegala estas la korpa dikeco en diversaj partoj de la spegulo pro la reliefaj desegnaĵoj sur la dorso; kiam ĝi estis muldata, la tempo de malvarmiĝo kaj la grado de kuntiriĝo varias en diversaj partoj de la spegulo kun diversaj dikecoj, tio estigis tre malgrandan malebenecon sur la spegula surfaco. Sed kial ne aperis tia fenomeno ĉe aliaj bronzaĵoj? Tion li ne povis klarigi, ĉar li ne konis la konkretan teknologion de la antikvaj speguloj, kaj povis diri nur “Eble antikvuloj havis por ni nekonatan teknikon.”

Por malkaŝi la sekreton, profesoroj de Fudan-Universitato kaj Universitato de Komunikadoj faris kune kun junaj instruistoj kaj laboristoj nombrojn da bronzaĵoj uzante la antikvan spegulon kiel modelon provante la metodojn kiel “tajladon”, “inkrustadon”, “varman traktadon” kaj “frotado-poluradon post muldo” por kompari la rezultojn kun tiu de la Okcidenta Han. Montriĝis, ke bronzaĵoj nove faritaj povas esti en malsamaj gradoj ankaŭ la diritan fenomenon. Kaj la speguloj faritaj laŭ la du lastenomitaj metodoj povas produkti la fenomenon samgrade kiel la antikva spegulo.

Pri la kialo de tio ke la antikva spegulo povas reflekti la bildon de la speguldorso, oni opinias, ke tion kaŭzis la efiko de variantaj streĉoj naskitaj de la surdorsaj reliefaĵoj al la surfaco de la spegulo dum malvarmiĝo. Kvankam la konkaveco kaj konvekseco kaŭzitaj sur la spegulsurfaco estas tre malgrandaj kaj nerimarkeblaj por la homaj okuloj, tamen ili estas sufiĉaj por kaŭzi diverĝojn kaj konverĝojn al reĵetitaj sunradioj kaj tiamaniere formi adekvatajn desegnojn en la reflektata lumdisko.

La rezulto de la esplorado ne nur liveras valoran materialon por esplori la historion de disvolvigo de scienco kaj tekniko en Ĉinio, sed ankaŭ havas referencan valoron por esplorado kaj farado de modernaj precizaj optikaj instrumentoj.

Ĉinaj proverboj

Se oni vipuron batas ne ĝis morto, rezulte sekvos ĝiaj mordoj.

Pelante tigron el la fronta pordo ne lasu lupon en vian postkorton.

Por aresti banditojn unue kaptu ilian ĉefon.

Sen grimpo sur altan monton oni ne povas rimarki ebenaĵon.

Cent aŭdoj malpli taŭgas ol unu vido.


Vera oro ne timas intensan fajron.

Al rato transkuranta straton, ĉiuj donas baton.

Estas tro malfrue en mezo de fluo por ŝtopi al ŝipo la truon.

Vizaĝe al riproĉo de mil homoj oni mortas eĉ sen malsano.

Se tri homoj havas saman koron, eĉ tero turniĝos en oron.



Grava memorinda donacaĵo

Antaŭtagmeze de la 4-a de oktobro de la pasinta jaro membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso Deng Jingĉaŭ intervidiĝis kun la usona amikino s-ino Lois Snow kaj faris kun ŝi intiman interparolon.

Okaze de la intervidiĝo s-ino Lois Snow donacis al Ĉinio okangulan militistan kepon, kiun ŝi kaj s-ro Edgar Snow konservis 39 jarojn. Kamaradino Deng Jingĉaŭ kaj kamarado Vang Jekiu, estro de la ŝtata Administrejo de Historiaj Kulturaj Objektoj de Ĉinio, kun ĝojo akceptis la gravan memorindan donacaĵon. En la jaro 1946, kiam s-ro E. Snow vizitis la revolucian bazon en norda Ŝenhi, la Ruĝa Armeo donacis al li militistan uniformon kaj la nenciitan kepon. Dum la vizitado



Deng Jengĉaŭ intervidiĝas kun s-ino Lois Snow.

s-ro E. Snow faris la valoregan foton "Prezidanto Maŭ en norda Ŝenhi". La kepo portata de Prezidanto Maŭ en la foto estas ĝuste tiu, kiun la

Ruĝa Armeo donacis al s-ro E. Snow. Kamaradino Deng Jingĉaŭ esprimis koran dankon al s-ino Snow pro la donacaĵo.

Frukto de amika kunlaboro

Antaŭ nelonge la kuracistoj de la ĉina medicina taĉmento laboranta en la Hospitalo de Selibaby kune kun la maŭritaniaj kolegoj en strikta kunlaboro sukcese amputis al iu senegala virino uteran tumoron kun pezo de 7.5 kilogramoj.

La Hospitalo de Selibaby sin trovas ĉe la suda landlimo de Maŭritanio proksime de Senegalio. An-

taŭ 6 jaroj oni trovis tumoron en la abdomeno de tiu virino. Kun tempopaso la tumorino fariĝis ĉiam pli granda, dum la pacientino malgrasiĝis tagon post tago. En julio de 1975 ŝi venis de Senegalio al la nomita hospitalo por peti kurachelpon.

La hospitalo estas negranda kaj por ĝi estis multaj malfaciloj por fari

tian komplikan operacion. Tamen post ripetada interkonsiliĝo, la maŭritaniaj kaj ĉinaj kuracistoj decidis venki la malfacilojn kaj krei kondiĉojn por fari tiun operacion.

La operacio estis farata antaŭtagmeze de la 1-a de septembro. La granda parto de la tumorino adheris al internaj organoj, kio multe malfaciligis la operacion. Sed dank' al

la strikta kunlaboro de la maŭritaniaj kaj ĉinaj kuracistoj, la operacio estis sukcese plenumita post streĉa klopodado en tri horoj kaj duono. 20 tagojn post la operacio la pacien-

tino jam resaniĝis kaj elhospitaliĝis. Nun ŝi jam povas aktivadi kiel sana homo.

Post sukceso de la operacio la gepatroj de la pacientino kaj multaj

maŭritianoj venis al la hospitalo por ilin gratuli. Ili laŭdis: "La sukceso de la operacio estas nova frukto de la amika kunlaboro de ĉinaj kaj maŭritaniaj kuracistoj."



Dadu-rivero

de ĈENG LIN


ĈIUFOJE kiam oni rakontas pri la mondfama Longa Marŝo de 25,000 lioj farita de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, oni senescepte mencias la perfortan

transpason de Dadu-rivero kaj fulmrapidan konkeron de la ferĉena ponto de Luding.

Dadu-rivero troviĝanta en okcidenta Siĉuan-provinco estas branĉo

de Mingiang-rivero. En majo de 1935, la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong venis al Dadu-rivero dum la Longa Marŝo. Tiutempe, la Ruĝa Armeo estis tage kaj nokte persekutata de centoj da miloj da soldatoj de la kuomintanga reakciularo kaj ĉiuj pramejoj de la rivero estis gardataj de multaj malamikoj. Ĉiang Kajŝek intencis fermi kaj ekstermi la ĉefforton de la Ruĝa Armeo apud Dadu-rivero. Sed la Ruĝa Armeo fulmrapide okupis la pramejon de Anŝunĉang sur la suda bordo de Dadu-rivero. Tie troviĝis nur malgranda boato kiu povis porti dekkelkajn homojn, sed sur la norda bordo staris bataliono de la malamiko. La 17 bravuloj de la pionira taĉmento de la Ruĝa Armeo transpasis la riveron per la boato en du grupoj sub ŝirmado de kanonado kaj okupis la pramejon de la transa bordo. Parto de la Ruĝa Armeo transpasis la torentan riveron en tiu loko. Ĉar la ŝipoj en tiu loko estis plejparte detruitaj de la malamikoj kaj la grandaj trupoj ne povis facile transpasi la riveron tie per la restantaj ŝipoj, la ĉefforto de la Ruĝa Armeo do marŝis plu norden laŭ la okcidenta bordo por kapti la ferĉenan ponton de Luding.

Mapo de Dadu-rivero



Luding estas grava trapasejo kaj la ferĉena ponto okcidente de ĝi estis la sola ponto super Dadu-rivero. Tiu ponto estis konstruita en 1906. Ĝi longas 100 metrojn kaj larĝas 3 metrojn. Ĝiaj 13 feraj ĉenoj estas alligitaj ĉe ambaŭ finoj al la rokmu- roj de la du bordoj kaj lignaj tabuloj estis fiksitaj sur ili. Kiam homoj iris sur la ponto, ĝi balanciĝadis, kaj estis timige rigardi de sur ĝi la furiozan torenton de la rivero.

Kiam la Ruĝa Armeo rapide atin- gis la ferĉenan ponton, la malamika armeo jam forprenis la tabulojn de sur la ponto. 22 bravuloj de la Ruĝa Armeo antaŭen puŝiĝis grimpante laŭ la ferĉenoj en kugla pluvo. La teruritaj malamikoj intencis bari la antaŭenpuŝiĝon per bruligo de la pontkapo, sed la bravuloj sturmis la pozicion de la malamikoj tra fla- moj kaj kaptis la ponton.

Post la famaj bataloj de perforta transpaso de Dadu-rivero kaj kaptio de la ferĉena ponto de Luding, Pre- zidanto Maŭ inspektis la batalejon, senĝene trairis la ponton kaj poste verkis la brilan version “trans Dadu la ferĉena pont’ streĉiĝas kun frost- bril’”. De tiam la torenta Dadu- rivero famiĝis, same kiel la heroaj faroj de la Ruĝa Armeo.

RIVERO KUN MIRINDAJ ASPEKTOJ

Dadu-rivero estas granda rivero kun multaj mirindaj vidaĵoj kaj im- pona beleco. Ĝi longas 1,155 kilo- metrojn kun densaj branĉoj en reto de valoj. La nivel-diferenco inter ĝia fonto kaj ĝia enfluejo estas pli ol 3,600 metroj. La branĉoj en la supra baseno serpentas sur la neĝ- montaro kaj vasta herbejo ĉe la sudorienta rando de la Kinghaj- Tibeta Altebenaĵo en larĝaj kaj malprofundaj valoj, kie la oblikveco de la tersurfaco estas neakuta. Vin- tre la rivero glaciĝinta fariĝas trans- irebla kiel ebena tero. La senlime vastaj herbejoj sur la bordoj ĉarmas per floroj en somero.

Malsupre de Keergu, la rivero fluas tra la nordorienta parto de Hengduan-montaro, kie la valo abrupte mallarĝiĝas kun krutaj rok- muroj ĉe ambaŭ flankoj kaj la fluo torentas kun ondegoj tiel furioze, ke oni povas aŭdi ĝian bruon je kelkaj kilometroj malproksime. Mi- rinde impona estas la tiea pejzaĝo. Precipe la parto de Luding ĝis Simian kun krutaj montoj kaj gro- teskaj rokoj sur ambaŭ bordoj kaj rapidega fluo formas gravan naturan baron. Gonggar-monto okcidente de la rivero kun alteco de 7,590 metroj super la marnivelo estas la


ĉefa montpinto de la Granda Neĝ- montaro kaj unu el la famaj altaj montoj de la mondo. Ĝi staras nur malpli ol 50 kilometrojn fore de Luding, sed la diferenco inter iliaj altecoj atingis pli ol 6,000 metrojn.

Malsupre de Simian, Dadu-rivero turniĝas orienten kaj zigzage fluas en valo relative larĝa. Malsupre de Hanjuan ĝi denove fluas en mallar- ĝan ravinon en alta montaro, kie “mallarĝas supre strio de l’ ĉielo, kaj bole ondas sube la rivero”.

En la malsupra baseno, Dadu- rivero fendas la krutan Daliang- montaron kun smeraldaj arbaroj kaj la pitoreskan Emej-monton kaj poste glate enfluas en ruĝan montetaron kun verdaj arbaroj kaj bambua- roj kaj ŝtupaj kampoj, kaj poste en la malgrandan ebenajon de Leŝan kun riĉa kamparo, kie la rivero plilarĝiĝinta kun multaj vel- ŝipoj kaj belaj montoj en la ambaŭ bordoj formas la plej ĉarman pejza- ĝon de Siĉuan-provinco. Kaj Emej- monto okcidente de Leŝan estas fama turisma pitoreskejo.

RIĈA BASENO

La baseno de Dadu-rivero estas vasta kun komplika topografio, tre malsamaj klimatoj kaj riĉaj produk- toj. Malsupre de Ginĉuan, oni po- vas akiri du aŭ tri rikoltojn de



Nova aspekto de la urbo Luding apud Dadu-rivero

greno en unu jaro pro la varmeĉo en la valo, kie la senprujna periodo longas je 180 ĝis 320 tagoj, dank' al tio ke norde ĝin ŝirmas altebenaĵo, tiel ke norda frosta aerfluo ne povas invadi la valon, kaj la varmo en la fermita valo povas longe teniĝi. La grundo de la valo ĉe Ĝinĉuan kaj Hanĵuan estas fekunda kaj tie irigacia kondiĉo estas bona, tial sufiĉe prospera estas la tiea agrikultura produktado kaj mezerizo povas esti kulturata en loko je 2,200 metroj super la marnivelo, dum en la meza kaj malsupra valo oni povas dufoje kulturi rizon sur la ebenaĵo. Kvankam la temperaturo en la alta regiono estas malalta, tamen tie estas forta radiado de la suno kaj oni povas kulturi printempan tritikon, hordeon kaj terpomon. La herbejoj en la supra baseno, kie paŝtiĝas ŝafoj, gruntbovoj kaj ĉevaloj estas unu el la ĉefaj brutobredaj bazoj de Siĉuan-provinco.

En la alta montaro ambaŭborde de Dadu-rivero kreskas densaj prarbaroj. La altaj kaj dense kreskantaj piceoj, manĉuraj abioj, ĉinaj cugoj kaj betuloj en tiu loko donas bonkvalitajn lignojn. En la tieaj ĝangaloj vivas mondfamaj raraj bestoj kiel grandaj pandoj, orharaj simioj, antilopoj kun torditaj kornoj kaj blanklipaj cervoj.

En multaj partoj de la valo de Dadu-rivero abunde produktiĝas subtropikaj kaj mezvarmzonaj fruktoj kiel piroj, juglandoj, mandarinoj, persikoj kaj persimonoj, inter kiuj la piroj de Ĝinĉuan estas la plej famaj. Post la Liberiĝo, oni plantis grandan kvanton da pomarboj en la baseno. Tie produktiĝas ankaŭ fritilario, vermherbo (*Cordyceps sinensis*), rabarbo, mosko, cer-va junkorno kaj aliaj valoraj drogoj kaj produktaĵoj kiel aleŭritaj fruktoj, vakso, morusfolioj por bredado de silkraŭpoj, teo kaj fruktoj de zantoksilo (*Zanthoxylum*), inter kiuj la zantoksilaj fruktoj de Han-

ĵuan estas famaj en internacia merkato pro siaj forta aromo, akreco, oleozeco kaj plaĉa koloro.

Dadu-rivero estas riĉa fonto de hidraŭlika povo kaj en ĝia baseno troviĝas multaj mineralaj rezervoj. La ekspluatado de ora kaj argenta minoj ĉe Ĝinĉuan kaj Luding jam havas longan historion kaj Ŝimian, kiu signifas en la ĉina lingvo asbeston, abunde produktas asbeston. La glimo produktata de Danba-gubernio estas fame konata tra Ĉinio. Tie troviĝas ankaŭ abundaj minoj de karbo, fero, kupro kaj raraj metaloj.

SENĈESA PROGRESO

En la malnova socio, la baseno de Dadu-rivero estis rigardata de la reakciaj regantoj kiel malfacile atingebla "necivilizita" regiono. Dum longa tempo la tieaj loĝantoj de tibeta, hana kaj ĵi-a naciecoj multe suferis de kruelaj subpremado kaj ekspluatado fare de bienuloj, lokaj regantoj kaj sklavmastroj, kaj estis tute senrajtaj en politiko kaj ilia produktado estis tre postĝinta. Antaŭvespere de la Liberiĝo terkulturado per fajro kaj glavo ankoraŭ estis praktikata en multaj lokoj. Tiea popolo havas gloran tradicion de batalo kontraŭ reakciaj regantoj. Kiam la Ruĝa Armeo atingis tiun regionon en sia Longa Marŝo en 1935, la jioj kaj aliaj nacimalplimultoj en tiu regiono helpis, kun malamo kontraŭ la kuomintanga reakcia regado, la Ruĝan Armeon transpasi Daliang-montaron, tiel ke la lasta povis rapide veni al la bordo de Dadu-rivero neatendite de la malamiko, kaj per tio ili faris kontribuon al la liberiga afero de la ĉina popolo.

Post la Liberiĝo, ŝanĝiĝis la fizionomio de la rivero kaj la industrio kaj agrikulturo en ĝia baseno vigle disvolviĝas. Tie fondiĝis multaj industriaj entreprenoj de minekspluatado, prilaborado de mineraloj,

arbohakado, prilaborado de ligno, prilaborado de brutaj produktaĵoj, maŝinfarado kaj tekstilado kaj konstruiĝis multaj grandaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj. Antaŭ la Liberiĝo, en la urbo Luding apud la fama ferĉena ponto troviĝis nur du malgrandaj forĝejoj, kiuj povis fari nur hufferojn kaj najlojn. Nun la loko jam havas industriajn fundamentojn kun fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj, cemento, ledoj kaj alkoholaĵoj, karbominejoj kaj elektrejoj. La produktokvanto de asbesto de Ŝimian-gubernio senĉese altiĝas.

La agrikultura produktado en la baseno de Dadu-rivero progresas kun ĉiu jaro. Anŝun-komunumo ĉe la antaŭa Anŝunĉang, kie la Ruĝa Armeo transpasis Dadu-riveron dum sia Longa Marŝo, estas avangarda unuo en lernado de Daĝaj. Ĝia produktokvanto de greno estas 5-oblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo, kaj nun ĝi marŝas antaŭen al agrikultura mekanikigo.

Ankaŭ la trafikado en la montoza baseno de tiu rivero multe progresis. Multaj novaj ŝoseoj kun totala longeco de pli ol 3,000 kilometroj interligas la 20 guberniojn en ĝi. La nove konstruita Ĉengdu-Kunming-a Fervojo serpentumanta en la valo de Dadu-rivero multe faciligis la trafikadon de la sudo al la nordo. Por kontentigi la trafikajn bezonojn multe kreskintan pro disvolviĝo de la industrio kaj agrikulturo, nun ĉe Luding, Keergu, Ŝimian kaj Ebian konstruiĝis aliaj pontoj kiuj ebligas facilan trapason de aŭtoj plene ŝarĝitaj de agrikulturaj produktaĵoj, ercoj, lignoj kaj ĉiutage bezonataj industriaj produktaĵoj tra la alta montaro. Dadu-rivero ankaŭ estas unu el la ĉefaj riveroj por transportado de lignoj en Siĉuan-provinco. La malsupra parto de tiu rivero, rigardata kiel danĝera vojo, nun fariĝis prospera akvovojo, post forigo de rifoj en malprofundejoj kaj instalado de navigaj signaliloj.



Giganta murtapiŝo “La Granda Muro”

de ĜENG JUN

LA Granda Muro estas grandioza konstruaĵo kreita de la ĉina antikva laboranta popolo antaŭ pli ol du mil jaroj kaj unu el la famaj antikvaj konstruaĵoj en la kultura historio de la mondo. Ĝi majeste staras pli ol du mil jarojn en la Oriento de la mondo kiel simbolo de la ĉina nacio kaj atesto pri tio, ke la historio estas kreita de la sklavoj.

La murtapiŝo “La Granda Muro” estas kreita de tiangin-aj tapiŝistoj kun artisma zorgemo.

Sur la antaŭlasta paĝo de ĉi numero de nia gazeto vi vidas foton de la dirita tapiŝo, kiu altas 5 metrojn, larĝas 10 metrojn, pezas 280 kg., enhavas 5,380,000 fadenodojn kaj estas farita per mil kaj kelkcent labortagoj, el 53,800,000 lanfadenoj de pli ol 240 koloroj. La giganta murtapiŝo nun pendas kiel donaco de la ĉina registaro en la ripoza salono de la domo de UN.

Kiel unu el la tradiciaj metiartaĵoj la ĉina tapiŝa arto jam havas historion de pli ol mil jaroj. Dank’ al diligenta kreado de multaj generacioj de nia popolo kaj asimilo de supercaĵoj de desegnoj de fremdlandaj tapiŝoj, la ĉinaj tapiŝoj havas sian originalan nacian stilon. Sed en la longa historio de la malnova Ĉinio, la produktado de tapiŝoj de Ĉinio estis limigita en malgranda skalo, malprosperiĝis tagon post tago kaj eĉ agoniis en antaŭvespero de la Liberiĝo. Post la fondo de la Ĉina

Popola Respubliko, la antikva tapiŝa arto ekradiis novan brilon. Nun 23 urbegoj, provincoj kaj aŭtonomaj regionoj, inkluzive de Pekino, Tiangin, Ŝanhajo, Ŝandong, Hingiang kaj Tibeto, produktas tapiŝojn ne nur en granda kvanto sed ankaŭ en bona kvalito. En la lastaj jaroj aparte rapide disvolviĝis la produktado de murtapiŝoj kaj la supre menciita verko “La Granda Muro” estas unu el tiuj kiuj atingis relative altan nivelon de tekniko.

“La Granda Muro” prezentas al ni la impone belan pejzaĝon de norda Ĉinio en printempa vesto. Sur la matena ĉielvolbo klara kaj lazura, kvazaŭ jus lavita, la leviĝanta suno disjetas orajn brilojn. La altaj

montoj similas al galopantaj ĉevaloj, la densaj arbaroj sur ili verdas smeralde kaj la grandioza murego serpentas sur montkrestoj kvazaŭ ora drako longega. La tuta bildo impresas per forta etoso de la socialisma epoko.

En kreado de tiu tapiŝo, tiangin-aj tapiŝistoj persone iris al la Granda Muro por pentri ĝin, komparis ĉ. cent fotojn kaj skizojn de tiu grandioza konstruaĵo kaj aplikis revolucionan realismon en kombino kun revolucionaria romantikismo. Por elstarigi la ĉefan parton de la murego kaj montri ĝian imponan gigantecon, la aŭtoroj dece altigis la alarmturon en la antaŭa plano kaj akcente strekis la sinuojn de la murego. La

Junaj tapiŝistinoj en laboro



zigzaga Granda Muro orkolora tek-
siĝas en kaj kontrastas kun la altaj
montegoj, tiel ke ĝi impresas per
ankoraŭ pli raraj ĉarmo kaj impo-
neco. La arbaroj kovrantaj la mon-
tojn estas prezentitaj en smeralda
koloro, tiel ke ili aspektas prosperaj
kaj vivecaj montrante la venkon de
la laboranta popolo de la nova
Ĉinio en reformo de la naturo kaj
la prosperecon de la socialisma Ĉi-
nio. En la antaŭa plano de la pen-
traĵo oni intence lokis altajn forti-
kajn pinojn, kiuj forte elstarigas, per
kontrasto de sia koloro, la Grandan
Muron kaj simbolas la senmortecon
de la ĉina nacio. Koncerne al la
lumo en la pentraĵo, oni elektis por
ĝi la sunlumon de ĉirkaŭ la 9-a horo
en mateno, sed multe grandigis la
helecon, tiel ke la pentraĵo plenas
je hela sunlumo kaj viveco kaj klare
montras la pejzaĝon. La ora mate-
na sunlumo brilas kontraste kun la

verdaj montoj kaj arbaroj tiel ke
la pentraĵo kun fundamenta tono
de klareco, viveco kaj printempa
etoso impresas per intensa lirikeco.

En kreado de "La Granda Muro",
oni kreive kombinis pentrajn tekni-
kojn kun la tradicia tapiŝa arto de
Ĉinio, laŭ la principo de literaturo
kaj arto "utiligi fremdlandajn en
servo al Ĉinio" kaj "forigi la mal-
novon por elvolvi novon". Apli-
kante la superecon de komponado
de la ĉina tradicia pejzaĝa pik-
turo la tapiŝistoj tiel aranĝis, ke
la montoj kaj la Granda Muro pres-
kaŭ tute plenigis la pentraĵon, tiel
ke ĝi impresas per pleneco kaj senli-
meco kaj sentigas al la rigardantoj
kvazaŭ ili persone starus ĉe la pen-
trita loko. Kaj krome, por montri la
majestecon kaj grandiozecon de la
Granda Muro kaj la smeralde ver-
dajn montojn, ili kombinis la tekni-
kon de apliko de delikataj strekoj

kaj pezaj koloroj en la ĉina tradi-
cia pikturo kaj prezentadon de
ksilografio per klaraj konturlinioj kaj
forta kontrasto inter helo kaj mal-
helo kun la tapiŝaj karakterizaĵoj de
simpleco kaj delikateco. Ili aplikis
ankaŭ la kolorriĉecon kaj superecajn
spacoprezentadon kaj multtavolecon
de olepentra arto, tiel ke la koloroj
en la pentraĵo estas en forta kontras-
to, la ombraj partoj havas riĉajn kaj
delikatajn nuancojn kaj la klare pre-
zentitaj malsamaj planoj de la pen-
traĵo plifortigas la efekton de spaco,
kaj per ĉio ĉi tio ili reliefigis la
objekton. La rektaj pingloj klare
distingeblaj de la pinoj proksime de
la alarmturo estas vivece prezen-
titaj per la eminenta originala tek-
niko de la ĉina tradicia tapiŝa arto.
Tiamaniere la revolucia enhavo
plene kunfandiĝis kun la perfekta
arta formo kaj formis novan artan
stilon kun nacia karakterizaĵo.



Pumi-nacieco

de ZONG MIN

EN la regionoj Ligiang kaj Hiĉang
ĉe la limo inter provincoj Jun-
nan kaj Siĉuan de Ĉinio, lignaj do-
moj de montvilaĝoj sin kaŝas en
pinaroj kaj verdaj bambuaroj; ŝtupaj
kampoj etendiĝas de ravinoj ĝis
monttalioj kaj irigaciaj kanaloj kiel
rubandoj serpentumas sur la montoj.
En tiuj regionoj multas krutaj
montoj, imponaj vidindaĵoj kaj pro-
duktaĵoj. La laboremaj kaj bravaj
pumi-oj vivas en tiuj regionoj de ge-
neracio al generacio.

La pumi-oj nombriĝas pli ol
15,000. Laŭ historia noto la pumi-oj

origine nomadis sur la Kinghaj-
Tibeta Altebenaĵo de la lim-regiono
ĉe la provincoj Kinghaj, Gansu kaj
Siĉuan. Poste ili iom post iom mo-
viĝis suden kaj en la 13-a jarcento ili
fiksiĝis en la lim-regiono de Siĉuan
kaj Junnan abunda je akvo kaj
herbejoj.

La pumia lingvo estas klasifikita
al la tibeta lingvogrupo de la tibeta-
birma lingvo-familio de la hana-
tibeta lingvo-sistemo. Ĉar en la pa-
sinta longa tempo la pumi-oj havis
konstantan kontaktiĝon kun la ha-
noj, pro tio la plejparto de ili

povas paroli kaj skribi en la hana
lingvo.

En la malnova socio la pumi-oj
vivis tre mizere. Krom kruela
eksploatado fare de la bienula klaso
de sia nacieco, ili suferis ankaŭ di-
versajn subpremadojn fare de lokaj
estroj de naŝi-nacieco, hanaj bie-
nuloj kaj la kuomintangaj reakciuloj.
La lamaejoj en lokoj de pumi-oj
ĝuis diversajn feŭdajn privilegiojn,
subpremis kaj ekspluatis pumi-ojn,
utiligante religian aktivadon.

Antaŭ la Liberiĝo, pumi-nacieco
estis en la disvolviĝanta stadio de

bienula ekonomio. Tiam krom malmultaj komunaj montoj, plejparto de la agroj apartenis al la bienuloj. La bienuloj ekspluatistis kamparanojn ĉefe per terrento de produktaĵoj, kiuj okupis duonon de la tuta produkto. Krome la farmantoj ĉiujare devis senrekompence labori ĉe bienuloj plurajn tagojn por haki branĉojn, prezenti donacaĵojn al kaj servi ĉe bienuloj en ĉiu festo aŭ en okazo de nupto kaj funebro.

La pumi-oj okupiĝis ĉefe pri agrikulturo. Pli ol 90% de ilia agraro estis sur montoj kaj iliaj akvokampoj estis tre malmultaj. Ili kulturas maizon, tritikon, fabon, avenon, hordeon, sekalon, poligonon k.a. La ekspluatado de la bienula ekonomio malhelpis la agrikulturon kaj la produktokvanto estis tre malalta pro la limigo de la naturaj kondiĉoj. La brutobredado okupis la duan lokon en la ekonomio de pumi-nacieco.

En 1949 la pumi-nacieco liberiĝis same kiel aliaj frataj naciecoj. En la tempo de 1952 ĝis 1956 la pumi-nacieco finplenumis la Agraran Reformon kaj suriris la interhelpan kaj kooperan vojon. En 1958 la pumi-oj de Lanping kaj Ligiang efektivigis popolan komunumigon kaj de tiam ili akiris pli kaj pli bonajn rikoltojn. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, rompinte superstiĉon kaj liberiginte sian penson, la pumi-

oj batalis kontraŭ la naturo por ĝin reformi. Precipe la Granda Proleta Kultura Revolucio akcelis tian amasan movadon de lerno de Daĝaj. Ni prenu Maŭniŭsan de Ninglang-gubernio kiel ekzemplon: Tieaj pumi-oj en la movado forhakis pli ol 50 grandajn kaj malgrandajn montpintojn, kreis pli ol 470 hektarojn da ŝtupaj kampoj, konstruis pli ol 100 irigaciajn instalaĵojn kaj pliiĝis la irigaciatan areon je pli ol 330 hektaroj. Kun revolucia spirito kuragi krei mirindaĵojn kaj iri novan vojon, ili sukcesis kulturi rizon en malvarma montregiono alta je 2,700 metroj kaj akiris riĉan rikolton sur granda areo. Tuodian-brigado de tiu gubernio pliiĝis sian totalan produktokvanton de greno de pli ol 350 tunoj en la komenco post la Liberiĝo ĝis 750 tunoj de 1973. Ĝiaj brutoj superis pli ol 8,800 kaj ĉiu loĝanto meznombro havas 4.5 brutojn.

Kun la disvolviĝo de la produktado, ankaŭ la kultura, eduka kaj higiena aferoj de la regionoj de la pumi-oj rimarkinde disvolviĝis. Ekzemple antaŭ la Liberiĝo en Juŝi-distrikto de Ligiang-gubernio nur infanoj de unu bienulo vizitis lernejon, kaj la ceteraj ĉiuj estis analfabetoj. Al la tuta regiono mankis kuracisto kaj por kuraci oni nur povis peti helpon de ŝamano. Nelonge post la Liberiĝo, plejparto



Juna pumio

de lernojaraj geknaboj ekvizitis lernejon kaj nemalmultaj mezlernejon. Ĉiuj lokoj starigis kuracejon kaj ankaŭ produktaj brigadoj havas sian sanitariston.

En la Printempa Festo la pumi-oj okazigas konkursojn de ĉevalraĵdo, pafado, luktado kaj dancas kolektivandan dancon. En iuj lokoj pumi-oj okazigas maturiĝan ceremonion al la geknaboj, kies aĝo atingis 13 jarojn.

Daŭrigo de p. 24)

NOVA GRANDA KARBOMINEJO EN GUJĜOŬ-PROVINCO





Lastatempe Gujĝoŭ finkonstruis grandan modernan karbominejon kun jara produktokapablo de 900,000 unoj. La minejo havas grandan

konservon de bonkvalita karbo. La plejparto de la karbokonservo estas uzebla por fari koakson inkluzive de gaskarbo, graskarbo k.a. miksaj koaksaj karboj. La karbofosado, transportado, aerumado, akvodrenado kaj la surteraj laboroj estas tute meĥanizitaj. En la ŝaktoj la lev-mallevado estas aŭtomatigita, la fosado estas sub koncentrita regado,

dank' al kio la laborintenseco de ministoj estas multe reduktita kaj la disvolvo de produktado multe rapidigita.

En konstruado de la ĉefa transporta galerio la laboristoj venkis torfan molan rokvejnnon, kaj 280-metran ekspansian zonan. Kaj la precizeco de trairedo de la galerioj superis la postulojn de ŝtata normo.

Pentristeto






Diligenta studado de Marksismo kaj Leninismo post laboro

Intelektaj gejunuloj turnis dezertejon en bonajn kampojn

Pli ol 100 intelektaj gejunuloj, kiuj fiksloĝas kaj laboras en Hujung-komunumo de Anhuj-provinco, reformis dezertejon en pli ol 50 hektarojn da kampoj de stabila kaj alta produktivo dum la akceptado de reeduko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Per la fakto de sia kresko en kamparo, ili profunde refutis la kalumnion de Lin Biaŭ al nova afero de fiksloĝiĝo de intelektaj gejunuloj en kamparo, forte kritikis la reakcian absurdaĵon distrumpetitan de Konfucio ke "kleruloj regas dum laboruloj estas regataj".

Antaŭe dezertejo, nun grenejo.



lekta junulino
Jumej (meze)
laboras kiel
sekretario de la
filio.



Traktoristino





Amatorino prezentas kantonon
el la revolucia moderna
kinopero "Sagiabang"



Anseroj breditaj de la intelektaj
gejunuloj



Bone disvolviĝas la amatora argila skulptado de kamparanoj en Huangpi-gubernio de Hubej-provinco. En mallonga tempo oni ellernis la arton kaj uzas ĝin por prezenti socialismajn novajn aferojn en strikta ligo kun la tri grandaj revoluciaj movadoj en kamparo kaj rikoltis laŭdojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Nun en la tuta gubernio iom post iom formiĝis vicaro de pli ol kvin cent amatoraj argilskulptantoj kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel ĉefa parto, kaj ili kreis preskaŭ du mil skulptaĵojn.

komunumano faras skulptaĵon temantan pri la diktaturo de la proletaro.

Amatora argila skulptado de kamparanoj

Rondira ekspozicio de novaj verkoj en diversaj brigadoj estas multe bonvenigata de komunumanoj.






La sekretario
la partia filio
iu brigado (n
dekstre) kuraĝ
la kamparan
amatorojn po
ili pli m
kreu verkojn
socialismaj n
aferoj.



Fervora skult
en laborp
sur kampo



Murtapiŝo


Tapiŝarto de Tiangin



Planktapiŝo



Farado de tapiŝoj



22359

